


Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2008 numero 3-a: junio-oktobro  
dissendo je la 4-a de septembro



Fotis Claude Gacond

Je la unua de aŭgusto ĉe la lago de Oberaargletcher.

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,  
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

2008-4 : novembro-decembro :  
oktobre 10.

2009-1 : januaro-marto :  
januare 10.

2009-2 : aprilo-junio :  
marte 10.

2009-3 : julio-oktobro :  
aŭguste 10.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
032 932 18 88.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.  
Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 076 261 06 09.  
Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.  
Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto :  
17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo  
2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

# Vivo de SES

2008-3 - Redaktis: Stefano Keller



## 1. UEA-SES kunlaboro en organizado de Simpozio ĉe UN

Okaze de la centjariĝo de UEA kaj de la 60-a datreveno de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj, Universala Esperanto-Asocio organizis internacian simpozion pri la temo: *Lingvaj rajtoj en la mondo*, ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, la 24-an de aprilo 2008.



Unu el la celoj de la evento estis aktive kunfesti la jaron de lingvoj, per altnivela partopreno en la tutmonda lukto por lingvaj rajtoj. Aliflanke, oni celis levi per tiu evento la prestiĝon de UEA antaŭ la okuloj de la neregistaraj organizoj, kiel konsiderinda aganto por ĉies lingvaj rajtoj en la mondo. Ekzistas ankaŭ deziro de UEA pruvi sian kapablon organizi aranĝon sciencan, envolvante signifajn verkistojn kaj sciencistojn de la mondo, aktivaj en la kampo lingvistika kaj homrajta.

La kriterion pri la elekto de invitotoj kaj celpubliko determinis tiel la celoj, kion bone respegulis la

konsisto de la partoprenantaro kaj prelegistaro, inter kiuj troviĝis altnivelaj oficistoj de UN, de NRO-oj, kaj fakuloj, sciencistoj de internacia renomo.

La organizado de la evento ambicia nepre bezonis kunagantojn en Ĝenevo por rektaj kontaktoj kun oficistoj de la UN sidejo kaj kun la diversaj NRO-j aktivaj sur la kampo de lingvaj rajtoj. Responde al la alvoko de la vicprezidanto de UEA, **Ranieri Clerici**, SES kontribuis al la organizado de la evento per donaco de CHF 1'000 kaj per la kunlaboro de sia sekretario *Stefano Keller*, kiu asistadis la ĉefdelegiton de UEA, **Charmian Common**.





**Cesco Reale** el Neuŝatelo same ne ŝparis siajn tempon, laborforton kaj kompetenton, kiam temis pri la disdivido de la taskoj inter la surlokaj kunlaborantoj.

Alia ankaŭ nemalhavebla kunorganizanto estis **Nicole Margot**, kies spertoj pri agadoj por-indiĝena, etno-lingva, redakta kaj movada estis tre utilaj dum la pretiga fazo de la simpozio.



En la realigo de tiu granda projekto, la rolo de la aktuala prezidanto de UEA, *Probal Dasgupta* kaj tiu de la antaŭa, **Renato**



**Corsetti**, estas nepre menciindaj - ili malavare engaĝis siajn fortojn en la pretiglaborojn, sub la tre kompetenta kaj zorgema gvido

de *Ranieri Clerici*.

La rezulto de la fortostreĉoj de tiu organiza skipo estis sukcesa simpozio internacia pri la temo por kies solvo naskiĝis Esperanto: la lingvaj homaj rajtoj.

Profesiaj interpretistoj donacis entuziasme siajn laborhorojn al la simpoziaj (kaj esperantaj) idealoj,


kaj dank'al ilia kunlaboro, la publiko povis elekti dum aŭskultado inter la tri laborlingvoj de la kunveno: la angla, Esperanto kaj la franca. La prelegoj disaŭdiĝis en la samaj tri lingvoj, laŭ preferoj kaj kapabloj de la intervenantoj. Tiel ankaŭ la esperantlingva ĉeestantaro povis foje kontente ĉeesti internacian kunvenon ĉe UN, kies oficistoj, samkiel la reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj klopodis diri kelkajn frazojn en la interetna lingvo.

**Renate Bloom**, antaŭa prezidanto de CONGO (Konferenco de NRO-j) inaŭguris la simpozion kiel unu el ties prezidantoj, laŭdante la fortostreĉojn de la esperantistoj por la respektigo de la lingvaj rajtoj.



Sekvis la salut-parolado de la prezidanto de UEA, Prof. **Probal Dasgupta**, kiu kunprezidis tiun eventon. Liaj vortoj pensigis la ĉeestantojn pri substancaj lingvaj rajtoj.

**Ricardo Espinosa** respondeculo pri rilatoj kun NRO-j en la Buroo de la Ĝenerala Direktoro de la Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj,



Ĝenevo (UNOG), la gastiganto de la simpozio, esprimis siajn bonvenigajn vortojn, parolante pri la lingva situacio kaj kondiĉoj de diversaj kunvenoj, konferencoj disvolviĝantaj ĉe UN.

**Anna Biondi**, la unua vic-prezidanto de la Konferenco de NRO-j (CONGO) tre pozitive parolis pri la lingvo Esperanto kaj ties movado, en sia salutprelego.



Nome de Svisa Esperanto-Societo, **Dietrich Weidmann**, unu el ties



kun-prezidantoj salutis la simpozion. Liaj esperantaj vortoj konsistigis unu el la maloftaj prelegoj, kiuj nuntempe aŭdiĝas ĉe Unuiĝintaj Nacioj

en la internacia lingvo.


*La ĉefprelegon pri la simpozia temo prezentis Dr. Tove Skutnabb-Kangas*, finndevena profesorino el la

Universitato de Roskilde (Danio), unu el la plej famaj lingvistoj kaj verkistoj nuntempaj en la kampo de la lingvaj homaj



rajtoj. «Lingvo, edukado kaj (malrespekto de) la homaj rajtoj» - titoliĝis ŝia prelego. Ŝia verko: «*Lingva Genocido en Edukado - aŭ Tutmonda Diverseco kaj Homaj*

*Rajtoj?»* (originale en la angla, esperanta traduko pretigata) estas rekomendinda al ĉiuj tiuj, kiuj serioze interesiĝas pri la mondaj lingvaj problemoj, pri biodiverseco kaj pri la futuro de nia planedo kaj de la homa komunumo. Ĝi estas fundamenta gvidlibro por agantoj pri lingvaj homaj rajtoj.



Profesoro **François Grin**, el la Universitato de Ĝenevo (Ecole de traduction et d'interprétation ETI) prezentis

sian modelon pri komunikado inter membroj de diversaj lingvogrupoj «La interkompreno kiel strategio por la lingva justeco».

**Michele Gazzola**, asistanto de Profesoro Grin, (UNIGE, ETI) prelegis pri la temo: «Universitata instruado: politikaj aspektoj de la internaciigo.»




Reprezentantoj de indiĝenaj popoloj el suda kaj norda Ameriko ĉeestis inter la invititaj prelegantoj. Iliaj intervenoj estas nepre priatentindaj ĉar indiĝenaj popoloj suferas plejmulte pro la lingva opreso, iliaj lingvaj rajtoj estas ofte malrespektataj. Sed oni ne devus iri foren de sia vivloko por konstati la saman problemon, kiu ja ekzistas ankaŭ ĉirkaŭ ni, kelkfoje tute proksime.

**Flor Rayen Calfunao Paillalef**, Mapučino el Ĉilio prezentis la situacion de sia popolo kaj respondis al demandoj de la simpozianoj.



El Norda Ameriko venis Ambasadoro **Ronald Barnes**, kiu



reprezantas ĉe UN en Ĝenevo la indiĝenojn de Alasko, kaj estas fondinto de la organizo: Koalicio de Indiĝenaj Popoloj kaj Nacioj (IPNC).

**John Mateo Lopez**, reprezentanto de indiĝenaj popoloj de Kolombio prelegis pri la temo: «Indiĝenaj popoloj kaj ilia lingva riĉeco el jura vidpunkto.»



La simpozio okazis laŭplane kaj ĝi estis sukcesa. Fakte, la ĉi-jara ne estis la unua tia okazaĵo ĉe UN, organizita de esperantistoj. Jam en 1998, la tiam UEA-prezidanto Lee Chong-yeong organizis pioniran simpozion en la ĝeneva UN-Oficejo.

UEA nun esploras eblojn pri daŭrigo. Oni deziras trovi altnivelajn, fakterene kaj internacie respektatajn kunagantojn, por krei, kunorganizi similajn eventojn, regule okazigotajn. Ni devas iri tiujn

vojojn, kiuj permesas al la esperanto-movado atingi organizan influon en lingvorajtaj temoj tutmonde.

La estraro de UEA opinias ke la svisa esperanto-movado havas specifan vokiĝon, kun la tasko esplori eblojn, ŝancojn ĉe la UN-sistemo de Ĝenevo, kiuj estus - noblasence - ekspluateblaj por niaj celoj. La kunlaboro de svisaj esperantistoj estas aprezata kaj plue dezirata.

La agado de esperantistoj surkampe de la lingvaj rajtoj pludaŭras. La retejo, kiu ĝis nun informis ĉefe pri la simpozio, iĝas informejo kaj kontaktejo pri lingvorajtaj problemoj kaj aktivecoj.

La celo estas: proponi la servojn de UEA al popolgrupoj, kies lingvaj rajtoj estas subpremataj aŭ ne respektataj. UEA povas interveni, portante la situacion je la atento de Unuiĝintaj Nacioj.

Iĝu kunlaboranto de la Agado por Lingvaj Rajtoj !

[www.lingvaj-rajtoj.org](http://www.lingvaj-rajtoj.org)

*Raporto kaj fotoj:*



**Stefano Keller**,  
komisiito de UEA  
ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo,  
sekretario de Svisa Esperanto-Societo

# *1. Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo, Berno, la 12-an de aprilo 2008*

## **1. Saluto, nombro de ĉeestantoj, senkulpiĝoj**

**31 membroj ĉeestas. Senkulpiĝoj:** Alain Favre, Stefano Keller, Nicole Piron, Richard Schneller, Mara kaj Daniel Schöni Bartoli, Nelida Weidmann.

**Forpasis en 2007:** Jean-Emile Waldvogel (1914-2007), Enrico Balmelli (1917-2007), Erna Döring (1920-2007), Stanislaw Pochanke (1931-2007), Hélène Reymond. **En 2008:** Claude Piron (1931-2008). Marguerite Jayet. Respekte al ilia memoro la asembleo duminute staras.

**Rimarkoj pri la tagordo kaj aliaj ligitaj temoj:** **Bruno Graf (BG)** rimarkigas, ke la jarraporto ne aperis, kiel anoncite, en SES-i no 2. Pri vortuzo, anstataŭ la vorto -akcepto- (por la protokolo kaj la raportoj), li preferas la pli precizan vorton -aprobo-. La kunprezidantino **Mireille Grosjean (MG)** pardonpetas pro la neapero de la jarraporto en SES-i. Tion kaŭzis granda streĉo de la sekretario, kiu kunlaboris al la pretigo de la simpozio organizata de UEA en UN. La kunprezidanto **Dietrich Weidmann (DW)** anoncas, ke ĝi estos publikigita en la venonta numero. **Christiane Sixtus-Pot (CSP)** rimarkigas, ke mankas en la tagordo punkto pri elekto de kaskontrolantoj.

Ĉar la sekretario, Stefano Keller, ne ĉeestas, lin antataŭos **Nicole Margot (NM)**.

## **2. Evoluo de la membraro**

14 novaj membroj aliĝis. La societo perdis 23 membrojn ĉu pro malaliĝo ĉu pro forpaso. **Arlette Di Vetta (ADV)** petas informojn pri la diversaj kategorioj de la membroj. Respondas la kasisto **Hans-Werner Grossmann (HWG)**: Dumvivaj membroj: **7** (-1), Honoraj membroj: **5** (-1) Patronoj: **21**, Junuloj: **7**, Simplaj membroj: **110** (-21). SES havas **148** membrojn entute.

**Claude Gacond (CG)** deklaras, ke li sendas la informilon al la membroj kaj al ĉiuj, kiuj lernas aŭ praktikas la lingvon. Kaj ĝenerale tiuj lastaj

donacas monon. Li proponas, ke ni decidu formale, ke ĉiu kontribuanto fariĝu membro de la societo. **DW**: «Ni ne povas diskuti nun pri tio, ĉar tiu punkto ne estas en la tagordo. Kaj oni devus respekti la volon de tiuj, kiuj ne deziras membriĝi.» Koncerne la malkreskon de la membroj **MG** konstatas, ke pli kaj pli da novaj esperantistoj lernas la lingvon per interreto kaj havas neniun ligan kun iu societo. Ĉiuj societoj perdas membrojn pro nuntempa individualismo. **DW** aldonas, ke malpli granda membraro ne signifas malpli grandan lernantaron.

### **3. Aprobado de la lasta protokolo pri la Ĝenerala Kunveno de 2007 en Ĝenevo**

Akceptita kun 1 sindeteno.

### **4. Vivo de la societo: aprobado de la estrarraporto**

**DW** ĝin legas. Koncerne la rilatojn de SES kun UEA li raportas, ke UEA, kunlabore kun la instancoj de UN, organizas simpozion okazontan la 24-an de aprilo 2008.

Pri la nova plurlingva revuo «Lingvo Futura», li anoncas, ke ĝia apero estas prokrastita al aŭtuno por pli serioze pretiĝi kaj eviti la “truon” de la someraj ferioj. Ne temas pri organo de SES. Ĝi estos sendependa sed ricevos startsubvencion de SES. Ĝi estos varba gazeto kaj ĝia celpubliko estos instruistoj, profesoroj, politikistoj ktp.

**DW** plu konstatas, ke la sperto pri kunprezidanteco estis sukcesa, malgraŭ unuaj kritikoj de iuj, kaj ke la agado de la du kunprezidantoj bone kompletiĝis. **MG** esprimas saman senton de sukcesa kunlaboro, kaj opinias, ke tiu dukapa prezidanteco estos aparte taŭga por la venonta jaro ĉar ŝi forestos de Svislando inter la 15-a de septembro kaj la 15-a de majo.

**DW** raportas, ke la komitato kunvenis trifoje en Bielo, centra urbo por la komitatanoj, kaj kie ili havis kontaktojn kun ĵurnalistoj. Malfacilas al komitato nur perrete rilati, kaj la estraro revenis al realaj kunvenoj.

La nuna estraro konsistas nun el 4 membroj, kaj induŝ elekti 5-an. Ĉar neniu alia kandidatiĝas **DW** proponas sian edzinon **Nelida Weidmann**. Ne ekzistas punkto en la tagordo pri elekto de estrarano, sed tiu elekto tamen estos proponita. **CSP** demandas, kion diras la statuto pri nombro de



estraranoj. **BG** respondas, ke la nova statuto akceptas minimumon de 3 membroj.

**BG**: «Ni dankas vin pro la politika paŝo antaŭen konkretigitan per la kandidatigo de UEA kiel Nobel-pacpremion.» **MG**: «Ĉar ni bone konscias, ke ni frontos aliajn kandidatojn pli prestiĝajn, la kandidatigo de UEA estos reprezentita en kazo de malelekto, ĉiujare se necesas».

## 5. Financoj. Prezento kaj aprobigo

**HWG**, la kasisto resumas. **CG** dankas la kasiston pro lia diligenta laboro. **MG** precizas, ke je la punkto 3230, donaco al KCE, temas pri la interezoj de pruntita sumo fare de SES al KCE (punkto 1060 de la bilanco), interezoj ĉiujare donacataj al KCE. **DW** legas la raporton de la kaskontrolantoj, **Dieter Rooke (DR)** kaj **Christiane Sixtus-Pot (CSP)**. La jarkalkulo de la jaro 2007 estas aprobita kun 2 sindetenoj. **HWG** disdonas skribitajn informojn koncerne la elspezojn por la Svisa Enciklopedio. **CG** kontestas dirante, ke tiuj informoj ne koncernas la asembleon. **BG**: «La eldonistoj estas SES kaj CDELI, tial normalas, ke SES-anoj estu informitaj pri la koncernaj elspezoj.»

**DW**: «La estraro devas esti reelektita nur ĉiujn tri jarojn, kaj ne okazos elektoj tiun-ĉi jaron. Pro tio ni ne trovas punkton pri elekto en la tagordo. Tamen kiel estis diskutita je la punkto 4 de la tagordo, mi proponas **Nelida Weidmann-González Fonseca** kiel novan estraranon.» Estas kontestoj pri tiu elekto ne antaŭe anoncita. **CG**: «La estraro rajtas mem elekti novan membron kaj prezenti lin/ŝin en posta ĝenerala asembleo. Sed elekto sen antaŭa propono neniam okazas.» Tiu elekto estas do prokrastita al la venonta jaro.

**CSP** demisias kiel kaskontrolisto, **DR** restas. Oni devas elekti novan kaskontrolanton. Ĉar malfacilas trovi kandidaton, **BG** akceptas tiun taskon nur por unu jaro.

## 6. UEA kaj ILEI : delegitoj

**MG** reprezentas SES-n en la komitato de UEA kaj ŝatas tiun laboron. Delegitoj de UEA al la UN-sidejo de Ĝenevo estas **Charmian Common**, **Dietrich Weidmann** kaj **Nicole Margot**.

## 7. Laboro plenumita de la estraro, projektoj 2008

Projektoj:

- Organizi ion por la familioj: ke okazu po unu renkonto jare por familioj.
- La 13-a de septembro 2008 estos tago dediĉita al la memoro de **Claude Piron**, kiam oni povos spekti filmojn faritajn de **François Randin** pri nia forpasinta honora membro. [Tiu renkono okazos je la 15a de novembro. *Redaktanto*]

## 8. Buĝeto

**ADV** demandas, kial pli altiĝis la sumo dediĉita al SES-informas (punkto 3110), kaj kial oni rebuĝetis sumon de CHF 4000.00 (punkto 3000) por varbado, dum ĝi ne estis komplete elspezita en 2007. **DW**: «Plialtigo de la prezoj postulis la buĝetigon de pli granda sumo por la informilo. Kaj pri varbado pli facilas buĝeti tro grandan sumon ol ne sufiĉe grandan.»

**NM** substrekas, ke estus eble utile klare ripeti al la lokaj societoj la eblecon ricevi subvencion por varba agado, sed ankaŭ por organizo de regionaj kulturaj aranĝoj. **MG** skribos pri tio en venonta numero de SES-i. El tiu varba sumo SES pagis CHF 1000.00 por la simpozio en UN. **CG**: «La numeroj de SES-i malkreskis de po 5 al po 4 jare ĉar neniam ni sukcesis akurati. La kostoj (papero kaj sendokostoj) altiĝis, tial oni altigis la koncernan buĝetitan sumon. Se necesas pli ol 4 numeroj, ni tion faros.» **CG** aldonas, ke de pluraj jaroj li redaktas SES-i kaj oni devas pensi, ke foje li devos esti anstataŭita. En la perspektivo de tiu anstataŭo **CG** provas kreskigi la nombrojn de kunlaborantoj, kiel li faris konfidante la kulturalan parton al **Richard Schneller**. Devus ankaŭ esti paĝoj por junuloj kaj infanoj, kaj paĝoj kun ludoj.

La buĝeto estas akceptita kun 2 sindetenoj.

## 9. Diversaĵoj

**DW**: «21 svisaj esperantistoj, inter kiuj estas 4 familioj, partoprenis novjaran aranĝon en Germanio kaj ĉiuj ĝuis la tagojn, inkluzive de la infanoj, kiuj teatrumis kun **Wolfgang Fischer**».

**MG**: «Okazis konkurso pri esperanto por junuloj en Ĝenevo. La premia distribuo okazos la 17-an de majo. Dankon al **CSP** kaj **ADV**, kiuj iniciatis

kaj organizis la konkurson. Prezentiĝis 17 kandidatoj, 18- ĝis 28-jaraĝaj, kaj 3 el ili flue parolis esperanton dum la ekzameno, dum tri aliaj meze sukcesis. SES planas reorganizi saman konkurson tutsvisan en 2009. Ĉu malaltigi la aĝon al 14-jaraĝo? CSP opinias, ke 18-a jaraĝo estas iom tro malfrua, ĉar tiuj homoj jam estas tro okupitaj ĉu de profesia eklaboro, ĉu de studoj.

MG anoncas, ke KCE festas tiun jaron sian kvardekjariĝon kaj okaze de tio organizas jubilean aranĝon la 13-an kaj 14-an de decembro 2008.

Protokolis Nicole Margot, la 12-an de aprilo 2008.



## ***2. Svisa Esperanto Societo : Jarraporto pri la jaro 2007***

### **Membraro.**

SES nombras 148 membrojn je la fino de la jaro. Malaperis 23 membroj pro malaliĝo aŭ morto. Ni menciuj la mortintojn:

- 2007: Jean-Emile Waldvogel (1914-2007), Enrico Balmelli (1917-2007), Erna Döring (1920-2007), Stanislaw Pochanke (1931-2007), Hélène Reymond.

- 2008: Claude Piron (1931-2008).

- 14 novaj membroj aliĝis. Ni bonvenigas ilin.

### **Aktivecoj.**

La 28-an de aprilo 2007 okazis ĝenerala kunveno de SES en Genevo.

Sub la aŭspicio de Svisa ILEI Sekcio, studsabatoj okazadas en CDELI ĉiun trian sabaton de la monato. Ili estas plej bona okazo

por lerni la lingvon kaj/aŭ progresi. Fidele kunvenas proksimume dudeko da gesamideanoj. Instruas tie ĉefe Claude Gacond, Monika Molnar, Luko Allemand kaj Stefano Keller.

Same okazadis la kulturaj seminarioj en CDELI en La Chaux-de-Fonds. Prelegas Claude Gacond. Vi konstatas, ke tiuj kunvenoj okazas ĉiam la unuan sabaton de la monato.

Plie lokaj grupoj aktive kunvenadas kaj havas sian propran vivon ie kaj tie en Svislando. Por scii pri tio, kaze ke vi vojaĝadas en nia landeto, vidu nian organon « SES informas ».

En novembro 2007 du parlamentaninoj neŭŝatelaj deĵorantaj en Berno skribis al Nobel-komitato en Oslo por

proponi UEA-n kiel ricevonton de Nobel-premio pri paco por la jaro 2008, jaro de 100-jariĝo de UEA. La 23-an de novembro okazis pri tio gazetara konferenco. Giganta eĥo okazadis en la gazetaro svisa kaj tutmonda. La du parlamentaninoj Gisèle Ory kaj Francine John ricevis amason da retmesaĝoj laŭdaj. Konsekvenco de tio estas ekverko de mocio en kantona parlamento neŭŝatela pri esperanto: «Valoriser l'espéranto»

### **Informado**

Mireille Grosjean daŭrigas sian laboron ene de Romandio. Paralele Dietrich Weidmann agadas en Alemanio. Rezulto de la laboro de Mirejo estas la grava paŝo de Gisèle Ory kaj Francine John.

### **Financoj**

Nia kara kasisto Hans-Werner Grossmann buĝetis plielspezojn en la alteco de CHF 8'350.00. La fina rezulto montras plielspezojn de CHF 3'620.30. Ni elkore dankas al li pro lia elstara laboro.

### **Organoj**

Nia organo « SES informas » aperis kvarfoje dum la jaro kun valoraj informoj ne nur pri la vivo de la societo, sed ankaŭ kun kultura enhavo. Ni elkore dankas al la redaktoroj Claude Gacond, Richard Schneller kaj Stefano Keller.

Nova revuo plurlingva «Lingvo futura» estas planita.

Preparlaboroj okazis en 2007. La unua numero aperos en 2008. Redaktistoj estas Dietrich Weidmann kaj Stefano Keller.

### **Universala Esperanto Asocio (UEA)**

SES estas landa sekcio de UEA. La ligoj estas tre regulaj. Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA. Pro la ĉeesto de UNO en Ĝenevo la komitato de SES rilatas kun UEA por zorgi pri kontaktoj inter tiuj du instancoj.

### **Nova labordivido ene de la komitato kun du kunprezidantoj**

Ekde la Ĝenerala Kunveno de majo 2006 Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann estas la du kunprezidantoj de nia asocio. La laboro funkcias glate kaj la farmaniero aspektas tute bona. La komitato kunvenis 3 foje en hotelo en Bielo, urbo atingebla por ĉiuj ene de unu horo proksimume. La komitato nun nombras kvar membrojn. Eble estus bone esti kvin aŭ pli. Kaze ke iu interesiĝas, bonvolu kontakti iun el la komitato.

Bielo, la 8-an de marto 2008,  
*Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann.*

### **3. Svisa Esperanto Societo**

#### ***Raporto de la kaskontrolantoj por la jaro 2007***

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Hans Grossmann la 6-an de aprilo 2008 en Bern por kontroli la librotenanadon.

La saldoj de la jaro 2006 estas ĝuste transskribitaj, la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj, same la saldoj fine de 2007.

Ni konstatis, ke la konto "Agado 2003" (CHF 3'852.80) malaperis tra la konto Kapitalo, laŭ la direktivoj de la estraro de SES !

Ni kore dankas nian kasiston pro la tre zorge farita librotenado, kiu

ne estas tiom facila - li povas trakti ciferojn nur se li ricevas pruvajn dokumentojn.

La fina rezulto de la kontoj 2007 estas plielspezo de CHF 3'620.30 (2006 : 4'155.85).

La kaskontrolantoj aprezis labori kun Hans Grossmann, kiu tre profesie librotenas la kontojn de SES, respondas afable kaj, kiam eblas, precize al ĉiuj iliaj demandoj.

Berno, la 5-an de aprilo 2008

Kaskontrolantoj: *Christiane Sixtus, Dieter Rooke*



#### **4. Donacoj ricevitaj: marto-julio 2008**

***Entute 2'060.- svisaj frankoj:***

(5) S-ro Traugott Rinaldo, Aebi, Ittigen; (30) S-ro Luc Allemand, La Chaux-de-Fonds; (1000) Anonimulo, por la Enciklopedio; (15) S-ino Louise Bachmann, Emmen; (90) S-ro David Buhlmann, Prilly; (15) S-ino Sonia Daubercies, Belmont; (5) S-ro Cornuet Didier, Genève; (120) S-ino Lucienne Dovat, Renens; (15) S-ino Elisabeth Eisenegger, Zürich; (15)

S-ro Peter Elmer, Zürich; (30) S-ino Nancy Fontannaz, Pully; (65) S-ino Andrée Gacond, La Chaux-de-Fonds; (15) S-ro Emilio Garcia Gomez, F-Ferney-Voltaire; (15) S-ro Walter Gaxer, Lausanne; (15) S-ino Claudia Gessler, Lausanne; (15) S-ro Ernst Glättli, Brugg; (30) S-ino Agnès Huguenin, La Chaux-de-Fonds; (30) S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds; (25) S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds; (30) S-ino Yvette Humbert Fink, Yverdon-les-Bains; (15) S-ino Marguerite Jaccard-Besson, Rolle; (30) S-ro Alois Koller, Zürich; (15) S-ino Verena Mallepell, Minusio; (65) S-ino Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz; (15) S-ro Peter Menzi, Oberengstringen; (30) S-ro Carlo Nicolodi, Allschwil; (25) Parzival, Biel; (25) Ge-roj François & Chantal Perret-Gacond, Genève; (25) S-ro Willi Rieser, Zürich; (10) S-ro Daniel Ruchti, Weissenburg; (100) S-ro André Sandoz, La Chaux-de-Fonds; (40) S-ino Ruth van Puijenbroek, Winterthur; (15) S-ino Marguerite Viredaz, Lausanne; (5) S-ino Paula Vité, Genève; (15) S-ro Dietmar Vogel, D-Freiburg i.Br.; (35) S-ro Fritz Wassmann, Hinterkappelen; (15) S-ro Henri Wettstein, Versoix.

### ***Patronoj 2008:***

S-ro Luc Allemand, La Chaux-de-Fonds; S-ino Anita Altherr, Onex; S-ino Christiane Andreae-Lätt, Denges; S-ino Nancy Fontannaz, Pully; S-ino Odette Fregonara, Genève; S-ro François Huguenin, La Chaux-de-Fonds; S-ro Alois Koller, Zürich; S-ro Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz; S-ro Carlo Nicolodi, Allschwil; S-ro Luciano Ortelli, Luzern; S-ino Françoise Pétermann, Lausanne; S-ro Fritz Wassmann, Hinterkappelen; S-ino Vera Zaslowski, La Chaux-de-Fonds.

***Koran dankon al la multaj membroj kaj abonantoj, kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 2008. Hans-Werner Grossmann, kasisto de SES.***



## ***La retejo de SES***

Ekde kelkaj monatoj Svisa Esperanto-Societo havas sendependan retejon kun nova adreso, kiu estas:


[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)

## *Muzike festiĝis la ora geedziĝo de Claude kaj Andrée Gacond*

Por festi sian oran geedziĝon Claude kaj Andrée Gacond organizis festan koncerton en la preĝejo de La Sagne, kie ili geedziĝis kvindek jarojn antaŭe la 17-an de majo 1958 jam sub muzika signo. Tiam en la gotika preĝejo ĉiuj gelernantoj de la vilaĝo ĝojigis la feston per siaj kantoj. Kaj inter ili aŭdiĝis la infana voĉo de Marie-Louise Münger-Ackermann, kiu prezidis la jubilean koncerton de la 17-a de majo 2008. Ne nur france ŝi esprimiĝis, ĉar esperanton ŝi lernis en la lernejo de La Sagne.



Andrée Gacond instruis bekflutadon en la Musik-lernejo de La Chaux-de-Fonds, tial bekfluta kvarteto formita de la plej lertaj lernantoj de la nuna instruistino Marie-Louise Thommen pretigis koncertan programon, al kiu Olivier Tzaut kontribuis per kantoj en la esperanta, franca kaj itala. Marie-Louise Münger enkondukis ĉiun koncertan parton per deklamo en esperanto kaj france de primeditindaj diroj de Pierre Ceresole, Julio Baghy kaj Lejzer Zamenhof, kiujn elektis Claude Gacond.



La publiko pleniginta la preĝejon konsistis ne nur el parencoj kaj amikoj de la jubileantoj, sed ankaŭ el instruistaj kolegoj kaj lernintoj, najbaroj, vilaĝanoj kaj

esperantistoj. Aperitivo agrable konkludis la festan aranĝon, ebligante variajn kontaktojn. Kiam alvenis la momento disiĝi, malgraŭ la pluvo Luc (Luko) Allemand gvidis marŝemulojn al la monto Tête-de-Ran ĝis La Vue-des-Alpes.



Martine Schneller servas Olivier Tzaut



Luko Allemand kun marŝontoj : lia patrino Jacqueline, Mario kaj Romain Bélisle, Anne-Marie Frutschi-Jaquet, kamaradino en la porinstruista lernejo, kaj ŝia edzo Edy.

### **La primeditindaj diroj laŭtlegitaj enkonduke al la koncertaj eroj**

De Pierre Ceresole (1879-1945), la fondinto de Servo Civila Internacia, el *Vivisian veron* :

Parolu al infano, kiel se vi jam estus sub la okuloj de la homo lojala, sagaca, postuma je lojaleco kaj vero, kiun vi esperas, ke li fariĝos unu tagon.

De Julio Baghy (1891-1967), el la romano *Hura !* :

La hundido restas dum sia tuta vivo hundo, sed la homidon oni tuj foredukas al germano, franco, japano, negro kaj nur poste li povas esti homo. Li edukiĝas unue al katoliko, hebreo, mahometano kaj nur poste al homo.

De Lejzer Zamenhof (1859-1917), el *Deklaracio de Homarano* :

Ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj liaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

Ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas ; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵon de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

*Noto: La fotojn realigis Nancy Fontannaz, Claude Gacond kaj Jean-Bernard Gruring. Kun multaj aliaj ili videblas kaj kopieblas, same kiel aŭdeblas kaj registreblas la koncerto je la retejo: [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)*



# Tutsvisa aktiveco

Kultura seminario de CDELI kaj SES

**La sabaton 11an kaj dimanĉon 12an de oktobro  
ni havos la privilegion refoje ĝui pri prelega vizito de la  
historiisto, esperantologo kaj verkisto**

**André Cherpillod**

La sabata programo disvolviĝos en CDELI kun la studtemo

## **UNU JARCENTON POSTE, LA INSTRUO DE IDO**

La unua parto de la prelego estos dediĉita al la naskiĝo de Ido. Estos montrate, ke Ido naskiĝis esence de la deziro, tiam ege disvastigita, al reformado de Esperanto. Estas certe, ke Esperanto ne estas perfekta, ĉar neniu homa kreaĵo povas esti perfekta. Sed la aŭtoroj de Ido ne konsciis pri tiu fakto, ke lingvo (iu ajn lingvo, etna aŭ plana) povas ŝanĝiĝi per natura evoluado (cetere tion ja faris Esperanto), sed ĝi neniel povas esti ŝanĝita per arbitra decido de iu aŭtoritatulo.

La dua parto estos dediĉita al lingva komparado inter Ido kaj Esperanto. Ne temas pri naiva laŭdo de Esperanto kaj stulta mallaŭdo de Ido. Tute male, temas pri objektiva komparado inter ambaŭ lingvoj, rilate plurajn punktojn de la lingvo (alfabeto, utileco de akuzativo, akordo de adjektivo, indiko de sekso, kunmetitaj verboformoj, vortfarado, ktp). El tiu komparado rezultos, ke en pluraj punktoj Esperanto solvis la problemon pli bone ol Ido (Ido estas tiukaze regreso). Sed en aliaj punktoj Ido solvis la problemon pli bone ol Esperanto (Ido estas tiukaze progreso). Estos montrate, ke Esperanto pliriĉiĝis, adoptante kelkajn Idajn eltrovojn. Kaj estos montrate ankaŭ, ke la genio de Esperanto kaŭzas, ke Esperanto funkcias ege kontentige, spite siajn difektojn. Male, Ido, tamen teorie vivipova lingvo, iom post iom malaperis, spite siajn plibonigojn.

### **Horaro de la sabato:**

10.00 : **malfermo de la CDELI-salono**, eblo aĉeti librojn de André Cherpillod, babili kaj kafumi.

**La prelegoj okazos en la freska salono Charles Humbert :**

10.45 : 1-a prelega periodo.

11.30 : paŭzo.

11.45 : 2-a prelega periodo.

12.30 : kuna foriro al tagmanĝo.

14.15 : 3-a prelega periodo.

15.00 : paŭzo.

15.15 : 4-a prelega periodo.

16.00 : Konkludo.

Kiuj buse veturos al La Vue-des-Alpes por ĉeesti la dimanĉan renkonton kun André Cherpillod, tiuj povos trafi buson al la Vue des Alpes je la 16.20.

En CDELI ĝis la 17.00 eblos teumi, diskuti kun la preleginto kaj aĉeti librojn.

**Aliĝo :** Por konvena organizo de la prelega tago necesas antaŭscii la nombron de la partoprenontoj, tial ĉiuj interesatoj bonvolu **sendi sian aliĝon inter la 22a kaj la 30a de de septembro al Nancy Fontannaz, ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo), ĉu rete :**

**nancy.fontannaz@gmail.com**

**Partoprenkotizo :**

La partoprenkotizo estas po Fr 20.- por persono. Por aliĝo post la fino de septembro tiu kotizo altiĝas al po Fr 25.- por persono. Duonprezo por la studentoj.

**Atentigo:** La sabatan programon sekvos dimanĉa programo franc-lingva en la Hotelo de La Vue-des-Alpes, kies temo estas:

*Des clartés sur la Bible.*

Informoj pri tiu dimanĉa aranĝo legeblas sur aldona franc-lingva folio. **Tiu informilo instigu franc-lingvajn esperantistojn ankaŭ partopreni eĉ kun parencoj kaj amikoj la dimanĉan renkonton, kiu estos tre interesa.**

Dum tiu dimanĉo statute oficialiĝos la help-agado de la asocio **Amis du CDELI** kaj de ties fakoj **Amis espérantophones du CDELI** kaj **Esperanto-Amikaro de CDELI**. La partoprenontoj al la renkonto de la 11a kaj 12a de oktobro ricevos informilon pri tiu agado, kiun ankaŭ diskonigos la ĵus kreita retejo :

[www.cdeli.org](http://www.cdeli.org)

-oOo-

.....

## **Tago pri Claude Piron**

### **Urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds**

### **15an de novembro 2008**

Nia kara kaj altestimata samideano Claude Piron forpasis subite en januaro 2008. Tio estis grava ŝoko kaj tristeco por ĉiuj.

Svisa Esperanto-Societo, CDELI kaj la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds deziras memori lian personecon kaj lian verkaron. Ĉiuj liaj amikoj, lernantoj, legantoj kaj ŝatantoj estas invitataj kunveni en La Chaux-de-Fonds omaĝe al li la sabaton 15an de novembro. Interalie parolos Anita Altherr, Mario Bélisle, Bruno Graf, Stefano Keller kaj Claude Gacond. Projekciiĝos filmo de Francisko Randin kaj aŭdiĝos radio-intervjuo.

**Horaro :**

Ekde la 10.00 : **Alvena akcepto en la CDELI-salono** ĉe la 2a etaĝo de la biblioteko kun amika kafumado, aĉeteblos libroj de Claude Piron kaj de aliaj verkistoj.

**11.00 : Salutoj kaj enkondukaj vortoj de Anita Altherr** kaj kuna iro al la biblioteka filmejo por spekti filmojn pri Claude Piron realigitajn de Francisko Randin.

**11.15 ĝis 12.45 : En la biblioteka filmejo** projekciado de la filmoj de Francisko Randin.

12.45 : Irado al la restoracio.

**13.00 : Komuna tagmanĝo** en najbara picejo.

**14.30 : En la biblioteka salono Charles Humbert** : Biografiaj notoj de Anita Altherr pri Claude Piron kaj mesaĝoj de Bruno Graf, Stefano Keller, Mario Bélisle kaj Claude Gacond, kiu aŭdigos radio-intervjuon kun Claude Piron.

**15.45** : Supreniro al la CDELI-salono kaj **konkludaj vortoj** de Anita Altherr kaj Claude Gacond.

Kaj poste ĝis la 17.00 eblos plue resti en CDELI por teumi, diskuti kaj aĉeti librojn novajn kaj brokantajn.

**Aliĝo** : Kvankam ne estos petita aliĝa kotizo, ĉiuj tamen bonvolu anonci sian aliĝon nepre ĝis la 10-a de novembro al Nancy Fontannaz : ĉu telefone : 021 728 31 27 (kun respondilo), ĉu rete :

[nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com)

**Atentige** :

Busa veturo al la biblioteko : Buslinio 4, direkto *Hôpital*, haltejo *Bibliothèque*. Bileto aĉetblas ĉe la stiristo de la buso.

Eksterhora alveno post la 11a : Anoncu vin ĉe la ĝiketo *Information* de la biblioteko.

-oOo-

---

# CDELI

**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoĵ : [claudio.gacono@ne.ch](mailto:claudio.gacono@ne.ch), [martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch), [nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

## Venontaj stud-aranĝoj !


Pro la oktobraj konferencoj de André Cherpillod kaj la novembra renkonto memore al Claude Piron ne estos stud-aranĝoj en tiu periodo. Ili reokazos ekde decembro.

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Claude

Gacond, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn : **2009 januare 17, februare 21 kaj marte 22.**

**Kultura seminario** okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **decembre 6, 2009 februare 7 kaj aprile 4.**

Studemuloj nepre rezervu tiujn ĉi datojn en sia agendo.



# Loka vivo

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**

PF 103, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

### Venontaj kunvenoj

**Septembre 25** : Rakontoj pri la ferioj.

**Oktobre 23** : S-ro Rainer rakontas pri Skandinavio.

**Novembre 27** : Pretigo de la programo 2009.

**Decembre 13** : Zamenhofa festo en Bazelo.

## Genève

**Esperanto-Grupo „La Stelo“**

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

### Raporto

#### Geneva printempo

*Simpozio pri Lingvaj Rajtoj, la 24an de aprilo 2008*

Tiu kunveno (kiu estas raportita pli

amplekse aliloke) estis feliĉa okazaĵo pro la bela vetero, la belega loko - Unuiĝintaj Nacioj en sia pacema parko - kaj ĉefe pro la intereso kaj atento, kiujn montris la ĉeestantoj. La simpozio celebris la Centjariĝon de UEA kaj la 60an Datrevenon de la Deklaro de Homaj Rajtoj - UEA volis emfazi lingvajn rajtojn, kiujn ĝi subtenas delonge.

La ĉef-preleganto, Profesoro Tove Skutnabb-Kangas, fama lingvisto, parolis pri "lingvo genocido" kaj ŝi donis tre bonan ekzemplon de perdo de scio, kiam lingvo mortas. Temas pri sciencistoj en norda Skandinavio, kiuj malkovris, ke salmonoj povas fraji en malgrandaj riveroj - ne nur en grandaj. Ili eldonis artikolon en scienca revuo. Sed poste homoj de la Samia (Saamia) popolo kontaktis ilin por diri "*Ni jam provis diri tion al vi - eĉ estas vorto en nia lingvo, kiu signifas etan riveron, kie salmonoj frajas*".

Profesoro François Grin, ekonomisto, parolis pri nova projekto por malaltigi la kostojn de traduko en Eŭropa Unio, pere de grupigo de lingvoj laŭ ties familia najbareco, tio por malgrandigi la nombron de traduklingvoj.

Posttagmeze tri prelegantoj parolis

nome de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio. Ili parolis pri la problemo de tiuj popoloj, kiu estas prezervi la gepatran lingvon, ekzemple kiam oni devigas ilin sendi la infanojn al ŝtataj lernejoj, kelkfoje 20 kilometrojn for

de la domo. Ili ĉiuj tri parolis emocie kaj kortuŝe. Lingvaj rajtoj ŝajne estas neglektataj en la kadro de homaj rajtoj.

Charmian Common.

-oOo-



Fotis Charmian Common

Charmian Common ĉe la Esperanto-budo en la foiro *Le Salon du Livre*

***LibroFoiro, de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo 2008***

La Libro-Foiro ĉi-jare estis tre bela, kun Ekspozicio pri la Oro de la Faraonoj, kun budo pri ortografio en formo de ĝardeno kun serĉado de indicoj, kun la Muzeo pri Naturhistorio kun travidebla abelujo kaj du vespertoj - kaj kun montoj da libroj! La temo de la Alternativa

Vilaĝo estis *Sano kaj klimataj ŝanĝiĝoj*. Okazis multaj debatoj kaj multaj filmoj estis montritaj. Por ligi tiun temon kun Esperanto mi redaktis broŝuron pri klimataj ŝanĝiĝoj, perdo de biodiverseco kaj de lingvoj - kaj kompreneble mi uzis la ekzemplan de Tove Skutnabb-Kangas por ilustru, kiel scio perdiĝas kun lingvo. Ankaŭ okazis debato pri *Esperanto - al kio ĝi utilas?* Sufiĉe

granda homamaso ĉeestis ĝin, kaj ni havis la plezuron aŭskulti Mireille Grosjean, kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo, Antonio Leoni, doktoranto pri lingvistiko ĉe la Universtato de Ĝenevo, kaj ankaŭ du el la gajnintoj de la konkurso pri Esperanto, kiu estis organizita de La Stelo : Mélanie Maradan kaj Adrian Tanner. Mireille Grosjean kunportis belan banderolon. Do neniu plu dubis pri la graveco de la temo!

Mireille Grosjean klarigis la utilecon de Esperanto en lando, kies nacia lingvo malfacilas, kaj kie la angla ne helpas - ekzemple Japanio. Antonio substrekis la gravecon de Esperanto kiel pontlingvo, ekzemple inter indiĝenaj popoloj. Pontlingvo faciligas komunikadon inter tiuj homoj, ĉar ili parolas ne centojn da lingvoj, sed fakte milojn! Mélanie kaj Adrian rakontis siajn spertojn lerni la lingvon en kvar monatoj - kaj oni ja povas diri, ke ili sukcesis!

Nia budo situis apud la elirejo de la Ekspozicio - ŝance ĉar multe da homoj preterpasis. Ni havis du aĵojn, kiuj kaptis iliajn okulojn - brilajn dekoraĵojn el arĝenta kaj kolora papero, kiuj turnadis spirale laŭ la ventblovo; kaj traduk-ludon, simplan frazon sur papero : *"La kato trinkis lakton, kaj dormas"* kun la titolo *"Aldonu vian lingvon!"* kaj kelkaj linioj por skribi ĝin. Kiam ni metis ĝin sur la antaŭa parto de la tablo kun skribilo, la pasantoj vidis ĝin de fore kaj scivolis. Krom la svis-alemana (3 dialektoj), la franca, la germana, la hispana, la angla, ni aldone kolektis lingvojn de la tuta

mondo : la albanan, la ĉinan, la bulgaran, la araban (3 malsamajn), etiopan (2), la makedonan, la vietnaman, la kreolan (Haitio), la volofan, inter aliaj - entute 42!

Ĉi-jare ni rimarkis, ke la vizitantoj ĝenerale jam sciis, kio estas Esperanto, kaj ofte venis por demandi, kie ili povas lerni ĝin. Pli kaj pli da junuloj interesiĝas pri la Lingvo Internacia, kaj la reagoj estas tre pozitivaj.

Charmian Common.

### ***La premio-donaco, la 17an de majo***

La 17an de majo okazis en Hotelo Bristol la donaca ceremonio de la premioj por la Konkurso pri Esperanto organizita de La Stelo. Mireille Grosjean parolis pri la konkurso kaj klarigis, kion la juĝistoj serĉis, kiam ili kontrolis la tekstojn de la konkursanoj. La tri gajnantoj estis Mélanie Maradan, Marion Rodriguez kaj Adrian Tanner, kiujn ni estis feliĉaj helpi ekparoli ĉe la Lunda Grupo. Mireille legis kelkajn liniojn de la tekstoj de la tri gajnantoj, kaj substrekis la altan kvaliton de la verkoj. Eĉ tiuj kelkaj linioj sufiĉis por tion montri al la aŭskultantaro - du tekstoj kaj unu poemo, ne nur perfekte verkitaj en Esperanto, sed ili traktis profundajn temojn, ekzemple pri milito kaj paco. Estis plaĉe vidi, ke tiom da junuloj interesiĝas pri Esperanto kaj kiom ili ŝajnis ĝui la konkurson.

Charmian Common.



Fotis Charmian Common

Premia ceremonio de la Esperanto Konkurso : la konkursantoj kaj ekzamenantoj

# Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20.00.

## Venontaj kunvenoj

**Oktobre 6** : Christiane Andreae parolos pri Japanio. En 2007, dum sia vojaĝo al la UK, ŝi enamiĝis al la lando.

**Novembre 3** : Sonia kaj Gilbert rakontos siajn spertojn en la 93a UK en Roterdamo.

**Decembre 13** : Zamenhofa Festo en Laŭzano.

**2009 januare 5** : Beno Frauchiger prelegos pri sia bicikla ĉirkaŭiro tra la mondo.

**Februare 2** : Ĝenerala asembleo.

**Marte 2** : Projekciado de kelkaj filmoj NANDIR, ekzemple la plej freŝdatan: La Patrolo de la Glaciejo.

**Aprile 6**: Decidote.

## Raporto

La surpriza ekskurso junia kondukis la migremulojn al la valeza vilaĝo Saint-Luc. La promenado laŭiris la vojon de la planedoj post vizito de la ĉielobservejo gvidata de fakulo.

-oOo-

# Luzern

## Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

## Venontaj kunvenoj

**Septembre 3** : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Oktobre 1** : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30 : Ludado kun Sonja Brun (ĉiu prezentu ludon).

**Novembre 12** : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

**Decembre 10** : ĉe ges-roj Anna & Koni Rey 14h00: Zamenhofologio kaj programo 2009 kun Paul Scherer.

**2009 januare 7** : Restoracio Bellini 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Sonja Brun.

## Raporto

### Interesa ekskurso

Denove nia diligenta ekskurso-gvidanto Koni Rey aranĝis tre belan kaj interesan ekskurson por la membroj de LESocieto, kiu okazis la 8an de aŭgusto. Sekve al prelegado pri iom malpli konataj vidindaĵoj, kiun prezentis Annelies Dettling en

la printempo, Koni Rey programis specialan itineron tra la malnova parto de la urbo Lucerno. Mi nur menciu kelkajn el la vidindaĵoj, kiuj impresis min:

- kelkaj pentraĵoj en la subtegmento de la *ĉapela ponto*, kiuj ne forbrulis en la granda incendio antaŭ kelkaj jaroj kaj kiuj klarigas en malnova germana lingvo la estiĝon de la urbo, antaŭ ĉio ties nomon;

- la preĝejo de *Sankta Maria in der Aŭ*, pli bone konata sub la nomo 'Franziskanerkirche';

- la *grejnbazara placo* kun la malnovaj mezuriloj *futo* kaj *ulno* fiksitaj ĉe la muro de la urbodomo, por ke ne estu dubo, kiuj estu la validaj mezuroj tie, ĉar ili variis de loko al loko;

- la *Theilinghaus*, kie laŭ surskribo ĉe la muro iam estis vendataj *ulnovaroj*;

- kaj kompreneble ankaŭ la *ŝprucfontano*, nomita laŭ la meceno *Wagenbach*, kiu donacis monon, por ke la urbo konstruu fontanon en la proksimeco de lia domo, ĉar li kompatis sian servistinon, kiu devis alporti la akvon de malproksime.

Post tiu instrua promeno ni multe ĝuis tre bone kuritan kaj prezentitan vespermanĝon sur la ankrita 100jar-aĝa vaporŝipo *Wilhelm Tell*.

Sonja Brun.

-oOo-



# Wil

Esperanto-Klubo Wil  
www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder,  
Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071  
393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj  
Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116  
Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O)  
071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la  
monato je la 19.00 en la Restoracio  
Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18 (piedire  
je kvin minutoj oriente de la stacidomo).

## Raporto

### Nia ateliero en la socia forumo

Ĉi-printempe Esperanto-Klubo Wil prezentis esperanton por la dua fojo ĉe SUFO (Sozial- und Umweltforum Ostschweiz): forumo por plibonigo de socio kaj medio.

La aranĝo okazis la 17-an de majo dum la tuta tago en Sankt-Gallen. Diversaj societoj proponis entute 52 atelierojn al pli ol 600 vizitantoj. Aranĝas tiun ĉiu-jaran renkontiĝon ekde la jaro 2005 junaj homoj el Sankt-Gallen.



Fotis Olivia Fischer

Wolfram Fischer respondas al la demandoj de la publiko interesata.

Post la bona sperto de la pasinta jaro, kiam ok personoj vizitis la atelieron pri lingvaj politiko kaj problemoj, kun prezento de

esperanto, ĉi-jare Wolfram kaj Olivia Fischer el nia Wil-a klubo preparis kurson pri esperanto. Dum en aliaj atelieroj partoprenis nur

kelkete da personoj, al nia Esperanto-Ĉambro venis pli kaj pli da homoj ĝis fine ni povis nombri 24 aŭskultantojn.

Ni ekis la kurson per priskribo de niaj motivoj pri lernado de esperanto kaj daŭrigis per klarigo de la kunmet-sistemo kaj per lernigo de mallonga dialogo. Kaj konklude ni havis tempon por respondi al demandoj.

Dum la du horoj estadis bona etoso inter la homoj, kiuj venis pro tre malsamaj motivoj. Juna virino ekzemple sciigis al ni, ke la organizaĵo "klima commitment", en kiu ŝi aktivas, planas traduki sian interretan paĝaron en esperanton. Al ŝi kiel al aliaj partoprenantoj plaĉis la lingvo kaj tio ĉi estis la plej

granda danko al la gvidantoj de la kurso.

Olivia Fischer.

Perreta informado:

[www.sufo.ch](http://www.sufo.ch)

[www.klima-commitment.ch](http://www.klima-commitment.ch)

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

-oOo-

# Zürich

**Esperanto-Societo Zürich**

(Adreso: Akazienstrasse 6, Poŝtfako 858,  
CH-8034 Zuriko)

**Informojn pri la aktuala programo de  
Esperanto-Societo Zuriko vi trovos en la  
reto sub:**

[www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht](http://www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht)

## Esperanto progresas en Afriko

### La ILEI-konferenco estis elstara evento

**Mireille Grosjean**

En julio kaj aŭgusto 2008 okazis ILEI-konferenco en Songhai-Centro en Portonovo, Benino. Mi partoprenis tiun ĉi konferencon. Kunvenis 45 personoj el 13 landoj. Por multaj eŭropanoj estis ilia unua vojaĝo al Afriko. El Afriko estis homoj el Benino, Togolando, Ebura Bordo, Ganao kaj Burundio. El Eŭropo estis homoj el Francio, Svislando, Italio, Nederlando, Ĉeĥio, Britio. Kaj finfine estis 5 japanoj kaj 2 personoj el Aŭstralio. Do kvarkontinenta renkontiĝo !

La etoso estis bonega. Multaj interparoladoj okazis inter la partoprenantoj. Neniu krokodilado !!! Abunda reciproka informado. Elstara kaj altnivela uzo de nia lingvo fare de ĉiuj. Valoraj programeroj konkretaj por geinstruistoj. Elstara laboro de la grupo de Jean-Pierre Boulet : verkado de libreto en kunlaboro kun UNESKO por gvidi afrikaninojn al pli sana nutrado. Interesaj kaj amuzaj programeroj vesperaj.

Okazis ekzamen-sesio. La Loka Ekzamena Komisiono konsistis el S-ro Jean-Pierre Boulet el Francio, S-ro Jasuo Hori el Japanio kaj mi. Tiu komisiono LEK devas esti plurlingva laŭ la regularo, ĉar temas pri Internaciaj Ekzamenoj de UEA-ILEI. Ses kandidatoj sukcesis kaj ricevis atestilon dum la bankedo.

La bezonoj de afrikanoj estas enormaj. Ni legas pri tio, tamen oni devas vidi tion, aŭdi tion. Ni nepre helpu, ankoraŭ pli helpu al ili. Ekzemple kadre de varbado pri Esperanto mi sendos dokumentojn (dekoj kuŝas en mia komputilo...) al la franclingvaj landoj de Afriko kaj niaj samideanoj povos uzi ilin, ne bezonos koncepti novajn. Kadre de ilia lernado de Esperanto endas, ke ili ricevu iujn verkojn, gazetojn, ktp kaj vortarojn por povi legi la ricevitaĵon. Mi eksciis, ke iuj veturas dum 30 minutoj por atingi kafejon kun ligo al Interreto, aliaj marŝas dum tri horoj por atingi saman lokon...

Partoprenis elstaraj geesperantistoj el la afrika movado: mi deziras citi Antoine Kouassi Kouablan el Ebura Bordo, Japhet Ntunzwenimana kaj Jérémie Sabiyumbva el Burundio, Privas Tchikpe el Benino, unua beninano, kiu eklernis Esperanton, Latifou Gbadamassi, prezidanto de Benina Esperanto-Asocio. Kaj aliaj. Kun ili ni analizis la restadon de diversaj eŭropanoj en Afriko kaj klopodis kompreni, kiel oni povas helpi unu la alian en respektoplena etoso. Afrikanoj proponis, ke mi fariĝu Konsilanto de Afrika Komisiono. Mi akceptis kaj la Afrika Komisiono same. Nuntempe mi verkas libreton « *Afrikanoj kaj mi* », kiu aĉeteblos dum la UK 2009.

Burundianoj kaj ganaanoj deziras fondi ILEI-sekcion. Mi iom priskribis la taskojn farendajn tiucelen.

Ni plantis arbon, oranĝarbon, dum ceremonio gaja kaj karmemora. Ni preparis ŝildeton « *L'arbre de l'espéranto 2007-2008* » « *la esperanto-arbo 2007-2008* », ĉar jam en 2007 okazis grava Esperanto-aranĝo en Songhai-Centro sub la gvido de Zsofia Korody.

Ĉio iris glate, la ejoj estis bonaj, la komforto pli ol sufiĉa, la manĝoj bonaj, fotokopii eblis, la vetero ŝanĝiĝema, pluvis kaj sunis, ne tro varmis, belega parko, kie nun kreskas esperanto-arbo. Ĉio en ordo laŭ mi.

Afrikanoj emfazis, ke Afriko devas esti iel pli ĉeesta en niaj gazetoj, pripensoj, eldonoj, vojaĝoj, ktp. Mi tuj vidis, ke mi povos fari tion en la ekzamenoj. Same kiel mi iom uzis la temon Japanio pro UK en Yokohamo en la verkado de la ekzamenoj, same Afriko povos fariĝi temo de diktaĵo, ktp. Jam mi trovis tri citaĵojn de afrikanoj por esti temo de eseo.

Poste mi analizas la situacion tiel: dum UK kaj aliaj renkontiĝoj eŭropanoj, azianoj kaj amerikanoj renkontiĝas kaj ekkonas unu la aliajn. Ekzistas granda rondo familia. Paralele naskiĝis forta movado en Afriko, pri kiu ni ne multe aŭdas, ne multe scias... Retmesaĝoj estas bonaj, tamen foje vera renkontiĝo alportas multon pli. Partoprenis S-ro Yasuo Hori, estrarano de UEA, kaj S-ino Aida Cizikaite, estrarano de ILEI. Tiu konferenco estis elstara evento kaj okazo kunvenigi ambaŭ grupojn kaj konstrui tutmondan esperanto-movadon !!

## Bona novaĵo!! Junuloj el Liberio

Songhai-Centro en Portonovo, Benino, estas interalie agrikultura institucio, kiu lertigas junulojn el Benino kaj el najbaraj landoj. Ĝi estas granda Centro kun 120 litoj. Kelkaj malsamaj grupoj povas samtempe labori en la Centro pri diversaj temoj. Mi partoprenis tie la konferencon de ILEI. Estis mia unua restado en Afriko.

Mi multe promenis en la Songhai-Centro 15-hektara kaj hazarde alvenis al halo, kie la studentoj-kampanoj vespermanĝis. "Avino, venu manĝi kun ni!" ili diris. Mi respondis: "Ne, dankon, post 20 minutoj mi manĝos kun mia grupo!" "Tamen restu kun ni!" Mi protestis, tamen venis plena telero por mi, mi devis manĝi, mi ne plu povis rifuzi. La telero entenis nutraĵon por junulo, kiu laboris en la kampoj dum plena tago... Tiel oni dikiĝas en Afriko...

Tie studis du junuloj el Liberio: Theophilus Trabor kaj Blanyon Befers Himmie. Ili estas proksimume 30-jaraj, inĝenieroj pri agrikulturo.

Do mi konatiĝis tiel kun Theophilus kaj Blanyon kaj ni parolis pri Esperanto. Ili volis tuj eklerni. Dum mia lasta tago en Portonovo mi instruis al ili kelkajn bazajn konojn pri Esperanto dum horo sur benko sub arbo. Ili lerte lernis. Ili petis, ke ni refaru lecionon la sekvan tagon. Temis pri la tago de mia foriro. Post la tagmanĝo, anstataŭ ol siesti, ni kunvenis kaj studis sub arbo dum du horoj. Ili malkovris la tabelvortojn kaj bonege kapablis dedukti el "ĉio – nenio" "ĉiam – neniam" ktp. Ili havis plezuron.

Mi donis al ili la retadreson de Paul Kwasi Mensah, esperantisto en Ganao, do junulo anglalingva.

Unu el ili diris: "Tiu ĉi momento estas grava: estas la unua paŝo al kreo de Esperanto Asocio de Liberio!!"

Bonvolu subteni ilin pere de salutmesaĝoj en la angla aŭ en tute simpla Esperanto. Retkontakto : Jtheotiabor65 ĉe yahoo.com kaj Bbhimmie ĉe yahoo.com

Por li elkore antaŭdankas Mirejo.

-oOo-

# Unuaj eĥoj el la Universala Kongreso

## Mesaĝo de Mireille Grosjean

### Svisa vespermanĝo en la Roterdama UK

merkrede 23an de julio 2008, restoracio Seij



Fotis Nancy Fontannaz

#### Luc Allemand kaj Mireille Grosjean

Antaŭ la komenco de la kongreso mi renkontiĝis kun Luko Allemand kaj ni manĝis kune en tiu restoracio. Belega ejo, bonega manĝaĵo, nemultekosta prezo, do ek, ni rezervis por la vespero post la ekskursoj. Mi anoncis proksimume 15 personojn. Kunvenis 24 personoj. Granda sukceso ! Ne ĉiuj estis svisoj ! Tute ne gravas ! Bonega etoso !

Negativa punkto estas tamen, ke ni kunvenis je la 19a, ke ni mendis je la 20a kaj ke ni manĝis je la 21a. Sed ni havis por rakonti, foti, skribi poŝtkartojn, ktp.

Dum tiu UK mi tiel konatiĝis kun kvar de mi ne konataj svisoj! Do iri al UK indas!

#### Jen kelkaj el la manĝantoj




Fotis Nancy Fontannaz

Armand kaj Yvonne  
Cotton



Fotis Nancy Fontannaz

Alain Favre kaj Nicole  
Margot



Fotis Nancy Fontannaz

François Randin

## Vizitantoj el la Roterdama UK al CDELI

**La unuaj gastoj estis gesinjoroj Tacuo kaj Masumi Huĝimoto el Kioto.**

Masumi kaj Tacuo Huĝimoto ĉe CDELI



Fotis Claude Gacond.

Tuj post la fermo de la UK unue venis nin renkonti Tacuo kaj Masumi Huĝimoto el Kioto. Ili ĝojis pri la progresoj de CDELI.


Tacuo donacis sian verkon *Esperanto tiel parolata* kaj informiĝis pri kunlaborebloj, interalie por la kompletigo de la libro-kolekto *Ludovikito*, al kiu li kunlaboris. Ambaŭ pozitive raportis pri la ĵus travivita kongreso kaj ŝatis ripozadi dum tri tagoj en Ĉaŭdefono antaŭ ol rehejmiĝi. Agrablajn rememoraĵojn ili konservis el pluraj staĝoj, kiuj estis siatempe organizitaj ĉe KCE, tial geamike ni babiladis okaze de kunmanĝo ĉe montara gastejo.

**Iliaj sekvantoj estis gesinjoroj Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor el Poznan.**

La paro Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor tuj anstataŭis la paron Huĝimoto. Same pozitive ili rakontis pri la UK. Ilona rememorigis sian unuan kontakton kun CDELI antaŭ 33 jaroj, kiam ŝi deĵoris kiel staĝulino el la Budapeŝta ELTE-Universitato. Kaj por ŝia nuna Interlingvistika Fako en la Poznana Universitato CDELI donacis librojn interŝanĝe al ŝiaj eldonaĵoj. Per amika fonduo en Chasseral festiĝis la 1-a de aŭgusto.



Ilona Koutny ĉe la movŝrankejo de CDELI.



Fotis Zbigniew Galor

Estas en tiu koridoro de la biblioteko, ke konserviĝas la riĉaĵoj de CDELI.


Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,  
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## Recenzoj pri *Universalaj Lingvoj en Svislando*

### • Richard Schneller

*La recenzoj aperintaj en la esperanta gazetaro pri la Svisa Enciklopedio Planlingva estas plejparte tre pozitivaj.*

Jam en la titoloj de la recenzoj oni uzis fortajn kvalifikojn: « La plej granda enciklopedio en Esperanto », « Fenomeno : *La Svisa Enciklopedio Planlingva* », « Mirakla verko pri mirakla movado » kaj eĉ : « La Verko ». (Ciferoj inter krampoj re-sendas al la fontindikoj [1] ĝis [10] fine de ĉi tiu artikolo.)



### De surprizo al entuziasmo

Por multaj recenzistoj estis granda surprizo ke tia verkego povis aperi, ekzemple por *Johan' Luko* : « Unua ŝoko : ni ricevas 6-centimetran dikan libron, pli ol milpaĝan, pli ol unu-kilograman, en malgranda litertiparo Times New Roman 10, sur belega papero, kiu pli similas al vortaro ol al niaj kutimaj eldonaĵoj tiutemaj. Kovrilpaĝoj tre belaj, en moderne profesia aspekto... vere tre brila prezentado. » [8]

*La Ondo de Esperanto* konstatas : « La eldono de Universalaj lingvoj en Svislando fariĝis evento en Esperantujo. Neniam pli frue en Esperanto aperis enciklopedia libro tiel detala, tiel riĉe ilustrita, kaj tiel ... peza. » [7]

Laŭ *Alen Kris* tia verkego povas esti favora argumento por Esperanto : « Dikaj – milpaĝaj – libroj en kaj pri Esperanto estas forta kaj peza argumento en la disputo ĉirkaŭ la praktika sukceso de tiu idealisma projekto. Ni forlasu por momento la ideon de fina venko – eĉ la angla ne povas nun pri ĝi fanfaroni. Ni forlasu por minuto la dimension de kvalito –

sukceso evidentas, se tiaj libroj aperas en situo, kie apenaŭ sentebblas iu alia motivado krom la kultura. Ni povas klare vidi ke ekzistas certa kritika maso, kiu generas – jam tute fatale – certan produkton, spontane, laŭ leĝoj de sia interna neceso, laŭ sia naturo. Ĝi, tiu maso, certe ne garantias al Esperanto longan vivon, sed kompanse kaj minimume ĝi garantias specifan senmortecon kompareblan kun tiu de la latino. » [4]

Interlingvistoj bonvenigis la verkigon kiel ekzemple *Detelev Blanke* : « Aperis vere giganta kaj unika enciklopedio, kiu entenas ĉion pri la planlingva movado en difinita lando... Laŭ historia aspekto Svislando verŝajne apartenas al tiuj regionoj, kiuj pro la enŝtata lingva reĝimo (kvar oficialaj lingvoj) okazis aparta kompreno pri la lingvokomunika problemo. Sekve en Svisio dum la jardekoj evoluis viglaj diversplanlingvaj movadoj. En Svisio ne nur Esperanto ludis grandan rolon, sed ankaŭ aliaj planlingvoj tie trovis siajn pionirojn.

« La aŭtoro Andreas Künzli (\*1962) studis slavistikon kaj orienteŭropan historion, krome internacian juron, en la universitato de Zuriko. Li finis siajn studojn per licencia (magistra) verkaĵo pri la historio de interlingvistiko kaj Esperanto en la Cara Imperio kaj en Sovetunio. Li nun laboras en la kampo de informadiko, gvidas i.a. la retejon [www.plansprachen.ch](http://www.plansprachen.ch). Li estas aktiva esperantisto ekde 1979 kaj laboris en diversaj funkcioj.

« La enciklopedio ne nur estas eksterordinara deponejo de scio sed samtempe monumento por unu el la

plej gravaj planlingvaj arkivoj en tutmonda skalo, se ne la plej grava.

Temas pri CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale), kies fondinto kaj honorofica arkivisto, Claude Gacond, estas same omaĝata per tiu ĉi verko. CDELI enhavas preskaŭ la kompletajn materialojn de Volapük, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua. Kompreneble la plej granda parto rilatas al Esperanto. La enciklopedion financis la tri supre menciitaj institucioj [CDELI, SES, Urba Biblioteko de Ĉaŭdefono], kiuj funkcias kvazaŭ kiel eldonejoj, krome sponsoris Claude kaj Andrée Gacond kaj André Sandoz-Giroud. La libron Künzli dediĉas al siaj gepatroj, tre simpatia gesto. » [1]

### Priskribo de la verko

Kion oni trovas en la enciklopedio? *Alen Kris* analizas : « La enciklopedio enhavas 12 partojn : enkondukan, sekciojn pri kvin lingvoj internaciaj, partojn interlingvistikan kaj esperantologian, kronologio-resuman, fontindikan, nomindeksan kaj fine – ŝlosilan vortaron. Krom tio, la enciklopedio entenas riĉan antologion, kies apuda ĉeesto estas tre gajna akiro de la libro : ĝi vivigas kaj kolorigas la necese sekajn informojn, multobligas ties efekton, portas suplementan scion kaj provokas aldonan intereson.

« La enciklopedio priskribas amason da faktoj de plej diversaj originoj. Sed, nature, kiel tion emfazas la aŭtoro, “la homo staras en la centro” de la libro, kiu, variigante la punktojn de l’ vido, rakontas – ofte



plurfoje kaj multeface – pri ĉirkaŭ 500 personoj.

« A. Künzli sukcesis transplanti en sian verkon la trankvilan, neŭtralecan, tolereman etoson de CDELI, pri kiu skribas enkonduke C. Gaccond. *Sine ira et studio* la enciklopedio traktas la plej problemajn temojn, kaj la polemikoj en la antologio nur substrekas tiun objektivismon. Feliĉe, la komenta neŭtraleco ne signifas ĉi-okaze mankon de propra opinio. Künzli scias neŭtrale informi, komenti, analizi, sed li scias ankaŭ sintezi. Li ne trudas, sed li ŝatas kaj trovas normala resumi.

« De ajna punkto de tiu libro ni plonĝas en realecon de faktoj kaj ideoj: etaj kaj egaj, abstraktaj kaj konkretaj, lokaj kaj universaj, ili interplektiĝas kaj katalizas la penson. La svisa enciklopedio kreskas el faka ĝis vere ĝenerala informilo. Ne nur svislandaj esperantistaj problemoj, sed tiuj de tuta Esperantio, ne nur Esperantio, sed ankaŭ la tuta homaro kun siaj drastaj doloroj sociaj kaj etikaj, ne nur Esperanto, sed ĝiaj rivaloj kaj la tuta planlingvistiko sin montras el tiu sisteme organizita aro de tekstoj, komentoj, informoj kaj rimarkoj.

« “Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045?” – demandas kun forta dubo Tazio Carlevaro. A. Künzli ne estas tiom senespera. Lia sobra optimismo sin apogas sur sufiĉe larĝa horizonto de la riĉa kaj bunta kultura stratumo, kiun li respegulis en sia varia, sed kohera kaj (oni devas konstati) arte komponita mozaiko. » [4]

*José Antonio Vergara* same konstatas du tendencojn rilate Esperanton

en Svisio : « Interese, dum el Svisujo venas iom paradokse al la Esperantomovado kaj instigaj argumentoj por pravigi la pluan strebadon (Claude Piron) kaj trankvila, pripensita konkludo pri neevitebla morto de la tuta afero post iom da tempo (Tazio Carlevaro), nun nia komunumo ricevas el la sama lando impresan mejloŝtonon en la formo de esploro kiu estas ne nur solide scienca, sed kapabla ludi etikan rolon. Jes, ĉar la alrigardo al la grandvalora heredaĵo kiun konsistigas la sindona, imagopova, kreema agado de centoj da esperantistoj (kaj aliaj interlingvanoj) tra la jardekoj, devus meditigi la nunan generacion de esperantofonoj pri la senco de nia okupiĝo kaj engaĝi nin al la digna konservado de la memoro, sen ajna dogmemo nek tento fali en strangan sektemon.

« La forto kaj morala atesto de tiu pasinta, kolektiva agado povus inspiri nin por la farendaj paŝoj en la nunaj, tute ŝanĝiĝintaj kondiĉoj, kun funde elpensita aliigo de la fokuso (el “neŭtrala dua lingvo por ĉiuj” al la pledado por lingva demokratio kaj lingvaj homaj rajtoj). Mi kredas ke tiuj homoj ne vane revis kaj laboris. Male, mi estas konvinkita ke multaj el tiuj penoj estis valoraj en si mem, ke tiu agado pliriĉigis la vivon de tiuj homoj ĉar orientita al signifoplena, supera celo. La dankinda, disciplina laboremo de Andreas Künzli ebligas al ni fieri pri la tradicio al kiu ni apartenas. » [10]

### **Historiografio**

*Gonçalo Neves* prilumas la historiografiajn kaj stilajn ecojn : « La

verko estas tre ampleksa kaj bunta. Ĝin malfermas kvar antaŭparoloj. En la kvara Künzli prezentas la metodikajn aspektojn de sia projekto. Tre grava kaj leginda teksto, en kiu li skribas i.a. ke “la historiisto devas okupiĝi pri la kaŭzologio, por fine eltrovi la historian veron, sen apliki ideologian historiismon, sen transformi la historion al propagando, sen krei el ideologio eĉ utopion aŭ mitologion” (p. 28).

« La ses menciitaj sekcioj konsistigas la propre Künzli-an parton de la verko. La aŭtoro mem verkis ĉiujn artikolojn, en Esperanto, per stilo klara, flua kaj plaĉa, kiu feliĉe kontrastas kun la pezaj vortumoj de multaj el la paĝoj de *Esperanto en Perspektivo*. Mi ne povas eviti komparon ankaŭ kun la fama *Enciklopedio de Esperanto*, kies artikoloj, kvankam skribitaj per flua lingvaĵo, ofte konsistas nur el teda sinsekvo de datoj, eventoj, postenoj kaj verkoj. En la enciklopedio de Künzli, kontraste, la artikoloj estas variaj kaj vivecaj, kvankam ne malpli science ellaboritaj.

« Künzli, kiel talenta enciklopedia verkisto, metas la individuojn en la centron de la historio prezentante ne nur ties agojn, sed ankaŭ ties pensojn, hezitojn, aspirojn kaj dezirojn, ĉiam surbaze de dokumentoj, sen spekulativo, sen fantazio. La individuoj aperas ne nur kiel historiaj agantoj aŭ plenumantoj, sed ankaŭ kaj eĉ precipe kiel personoj, kun siaj meritoj kaj virtoj sed ankaŭ kun mankoj, kapricoj kaj manioj. Tial li ne hezitas prezenti ankaŭ faktojn kaj eventojn kiujn aliaj historiistoj – pli

kabinetaj kaj severaj – eble opinius “minoraj”, aŭ eĉ anekdotaj.

« Alia menciinda faceto de la aŭtoro estas lia objektiveco. Ĉi-verke li pritraktas ne nur figurojn kies korpojn jam longe glutis la patrino, sed ankaŭ homojn ankoraŭ vivantajn kaj agantajn, homojn kun opinioj kaj metodoj foje polemikaj, foje diverĝaj de tiuj kiujn la aŭtoro manifestis private kaj publike, skribe kaj parole, dum sia esperantista vivo. Tamen Künzli sukcesas submeti la koron al la intelekto. Li prezentas faktojn kaj figurojn kaj komentas ilin, sed liaj komentoj ĉiam impresas racie, sobre kaj ekvilibre. Ili ne trudiĝas, ne celas konvinki aŭ persvadi, eĉ ne “gvidi” la leganton, sed nur ilustras kaj prilumi la eventaron. La objektiveco de la aŭtoro plene manifestiĝas en lia pritrakto de polemikaj figuroj kaj faktoj. Ekzemple liaj longaj artikoloj pri la tiel nomata Civito kaj ties “konsuloj” (p. 242-249), pri Serge Reverdin (p. 618-620), kaj pri Gonzague de Reynold (p. 621-626), estas vere modelaj kaj atestas la eksterordinaran kapablon de Künzli teni sin objektiva kaj senpartia kiel historiisto, malgraŭ siaj konvinkoj kiel movadano. » [5]

### Utileco de la libro

Pluraj recenzistoj opinias ke la Enciklopedio estas utila ankaŭ al esperantistoj ekster Svisio. La plej entuziasma prijuĝo estas verŝajne tiu de *Gonçalo Neves*: « Mia fina impreso estas tre favora. La enciklopedio de Künzli estas unu el la plej gravaj sciencaj verkoj ĝis nun verkita en esperanto, se ne la plej grava.

Ĝi interesas ne nur svisajn esperantistojn, sed la tutmondan adeptaron de la kvin ĉefaj planlingvoj kaj ankaŭ ajnan fakulon aŭ studemulon pri interlingvistiko. Ĝi estas verko kiu ne povas manki sur la breto de ĉiu serioza planlingvano kaj interlingvisto. De nun oni abunde referencos al ĝi kaj nomos ĝin simple *La enciklopedio de Künzli*. Ĝi estos *La Verko*. La svisa slavisto kaj interlingvisto jam starigis al si monumenton pli daŭran ol bronzo. Tio nomiĝas gloro. Li ĝin meritas. » [5]

Ankaŭ la interlingvisto *Detlev Blanke* rekonas la meritojn de la aŭtoro de la Enciklopedio : « En la konkluda parto Andreas Künzli i.a. skribas: “En sia historia dilemo inter revo kaj realo la esperantistoj kaj planlingvanoj ankoraŭ longan tempon devos resti grandaj idealistoj.” (p. 1005). Li certe pravas. Tamen, la modelo planlingvo funkcias. Kaj ke ĝi funkcias ankaŭ dankindas en konsiderinda amplekso al Svisio. Ĉu la modelo iam ludos pli grandan rolon en internacia kadro dependas unuavice de politikaj-ekonomiaj faktoroj. Andreas Künzli sendube apartenas al tiuj “grandaj idealistoj” kaj meritas nian dankon kaj aprezon pro sia nekutima verko. Per ĝi li digne eniris en la historion de interlingvistiko. » [1]

*Ed Borsboom* jam esprimis sin en *SES informas* 3/2007 pri la valoro de la Enciklopedio : « La komenco de la libro, 146 paĝoj, konsistas el enkondukaj, ofte fascinaj artikoloj de diversaj aŭtoroj: Graf, Gacond, Künzli, Piron, Carlevaro, Baur alterne en la lingvoj esperanta, franca, angla, germana, itala, retoromanĉa.

Malantaŭe troviĝas la kutimaj ĉapitroj, 122 paĝoj, kun resumo, fontoj, bibliografio, nomindekso.

« La meza parto tamen liveras en formo de laŭ-alfabeta enciklopedio la svisan esperantan historion ĝis hodiaŭ. Tio lasta signifas ekstreme valoran elementon por nia historiografio, ĉar mankas en Esperantio libroforme aktualaj sciigoj pri homoj kaj aferoj. Jam el tiu vidpunkto mi konsideras la gigantan redaktaĵon de Künzli grava kaj utilega. » [2]

### Kritikoj

Kelkajn nekoheraĵojn ne pretervidis la eksperta okulo de profesoro *Detlev Blanke* : « Alfabeto listo de la biografie prezentitaj personoj troviĝas ĉe la fino de la libro, bedaŭrinde sen paĝindiko. Ili devintus esti enirintaj en personindekson, kiu ankaŭ enhavu listigon de tiuj personoj menciitaj dise tra la verko. En la lasta fazo de la finpretigo de la verkego al la aŭtoro verŝajne mankis la forto. Sed li aŭ alia persono nepre devus ellabori tian indekson. En la libro troviĝas 11 kunligitaj sed aparte presitaj eseoj (antologioj) kun entute 40 gravaj interlingvistikaj eseoj, aparte de svisaj aŭtoroj, sed ne nur (ekz. ankaŭ de Julio Baghy, Wilhelm Ostwald [en la germana kaj Ido] kaj L. L. Zamenhof). Temas pri ofte ne tre konataj aŭ malfacile alireblaj tekstoj, signifaj por interlingvistiko (i.a. de Arthur Baur, Ric Berger, Pierre Bovet, Tazio Carlevaro, Auguste Forel, Claude Gacond, Fritz Haas, Hector Hodler, Ernest Naville, Edmond Privat, Gonzague de Reynold, André Schild, Eduard Schwyzer). La tekstoj aperas en la

originalo (en la lingvoj angla, franca, germana, krome en Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua). Ĉiu teksto havas esperantlingvan enkondukon. Ne estas klare, kial la tekstoj estas dissemataj tra la libro. Ili facile povus formi iun memstaran antologion, kvazaŭ anekso. » [1]

Persone mi opinias ke pro praktikaj kialoj oni eĉ estus povinta fari du volumojn kun la avantaĝo ke la Enciklopedio estus pli manipulebla, malpli peza en du unuopaj volumoj. La antologiaj tekstoj, kiuj tamen iom ĝenas dum konsultado, kaj la indekso estus trovintaj lokon en la dua volumo. Se oni estus aperiginta la unuan volumon ĝustatempe, oni havintus tempon por prepari la indekson por la dua, kiu estus povinta aperi la sekvan jaron. Tiel ofte faras spertaj eldonistoj de referencverkoj.

Anonima kritiko (subskribita de *HeKo*) venas ankaŭ de la Esperanta Civito, kiu ĉefe konsideras la parton ĝin koncernantan. Ĝi konstatas ke «...ok paĝoj estas dediĉitaj al la kelkvara Esperanta Civito: tre rimarkinda kvanto, se konsideri ke al UEA (1908-1947) plus IEL/UEA (1936-ĝis nun) la aŭtoro dediĉis nur dek unu, kaj al SAT (1921-ĝis nun) apenaŭ tri (sub la anonima titolo *Laboristoj*). La granda atento de la aŭtoro pri la tuta fenomeno estas per si mem laŭdinda, des pli ke li havas neniun meriton pri ĝi. Laŭdinda estas ankaŭ la metodo de rekta transskribo el la fontoj, kaj estus ankaŭ la metodo de la parolvico asignita ĉu al la subtenantoj ĉu al la kritikantoj. Estus, se ĉi-lastan metodon la aŭtoro aplikus sisteme, aŭ ankaŭ aliloke – male, ĝi ŝajnas

privilegio rezervita al la Civito. «Ne laŭdinda estas la grado de emfazo pri la esprimitaj opinioj, kiu iom post iom perdas je ekvilibro, laŭ diversaj manieroj – jen menciante gravajn UEA-gvidantojn nur kiel mildajn simpatiantojn, dum ili petis la civitanecon kaj eĉ foje altrangas en la Civitaj instancoj; jen substrekante la opinion de tute periferiaj bankrotuloj, ĉar ĝi eble kongruas kun la opinio de la aŭtoro mem. Tiele, “paŝon post paŝo” kaj paĝon post paĝo, la aŭtoro eĉ malkovras sin mem kiel ne fidindan historiografon, ĉar simpatianta al homoj kiuj emas kaŝi la deliktojn kiuj makulas la lastajn jardekojn de IEL/UEA. Eraro aparte grava ĉe homo, kiu konas kaj cirkonstancojn kaj viktimojn. » [3]

*Johan' Luko* prave rimarkigas tiurilate: «Oni ankaŭ trovas kompletajn informojn pri aktualaj problemoj de la esperantistaro, ekzemple plurajn paĝojn pri la Esperanta Civito, kiu naskiĝis en Svisujo; tamen oni kompletigu ilin per la legado de la intervjuo de Andreas Künzli en la Junia-2007a numero de *La Ondo de Esperanto*, kie li eble pli familiare kaj libere donas sian personan opinion. » [8]

La SAT-aktivulon *Vinko Markov* kompreneble interesis la laborista movado en Svisio: «Eblas ekscii kelkajn interesajn informojn pri la specifa agado de la svisaj laboristaj esperantistoj, kiuj kiel ĉie fortis ĉefe inter ambaŭ mondmilitoj, sed plu vivas danke la klopodojn de kelkaj kamaradoj, pri kiuj la libro donas biografiajn informojn, kiuj malfacile troveblus aliloke. Kvankam menciitaj, la kongreso de SAT-Amikaro en

Laŭzano (1973) kaj de SAT en Bazelo (1981) kaj Ĉaŭdefono (2003) bedaŭrinde ne estas detale pri-skribitaj. » [9]

### Ĉu iam dua eldono ?

En longa intervjuo (tradukita el Ido) fare de *Gonçalo Neves* kaj rete publikigita, Andreas Künzli respondas al la demando *Kiel vi spertis la kunlaboron kun aliaj, kaj kion vi intencas entrepreni por publikigi korektojn kaj kompletigojn ?* : « Kvankam mi ofte sentis min iom soleca en tiu de mi mem elektita projekto (sed tio principe ne ĝenis min), mi tute ne riproĉas al iuj ajn ion ajn, ĉar ĉio lige kun la enciklopedia projekto estis honorofica, libervola, kiel preskaŭ ĉio en la Esperanto-movado. Pro tio en tiaj kondiĉoj oni ofte laboras kiel amato, diletanto. Kiuj vere interesiĝis kaj havis tempon kunlabori kaj helpi al mi, tiuj faris tion kaj al tiuj mi dankas.

« Dua eldono de la libro mem plej imageble ne aperos, ĉar la lastaj 400 de presitaj 600 ekzempleroj devas esti venditaj. Ekzistas la intenco (kaj promeso) aperigi korektojn kaj kompletigojn en formo de kromkajero(j), sed tio unue okazas certe tra la retujo [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch). » [6]

**Kunlabore CDELI kaj SES pretigas la eldonon de la mankanta nom-indekso.**

### Fontindikoj

[1] Blanke, Detlev: Fenomeno: La Svisa Enciklopedio Planlingva de Andreas Künzli. *Informilo por Interlingvistoj* (IpI), n-roj 61-62 (2-3/2007), p. 12-14.

[2] Borsboom, Ed: Bona svisa vino al la fino. *SES informas* 3/2007, p. 25-28.

[3] *Heroldo Komunikas*: Svisa enciklopedio pri la Esperanta Civito. HeKo 325 2-A 2.3.2007 (reta artikolo).

[4] Kris, Alen: Kohera mozaiko. *La Ondo de Esperanto* 8-9/2007.

[5] Neves, Gonçalo : La Verko. *Esperanto* 10/2007, p. 207-208.

[6] Neves, Gonçalo : De Suisia, la olima oasizo... Intervjuo kun Andreas Künzli en Ido kun traduko esperanten (reta artikolo).

[7] *La Ondo de Esperanto*: La plej granda enciklopedio en Esperanto. Andreas Künzli respondas. *LOdE* 6/2007, p. 3-4.

[8] Luko, Johan': Universalaj Lingvoj en Svislando. *Sennaciulo* 7-8/2007, p. 110.

[9] Markov, Vinko: Svisa Enciklopedio Planlingva. *La Sago* n-ro 34/2007, p. 7.

[10] Vergara, José Antonio: Mirakla verko pri mirakla movado. *Libera Folio* (reta artikolo) 2007.9.27.

Pliaj recenzoj kaj la retaj adresoj de la supre menciitaj artikoloj estas troveblaj sur : <http://www.plansprachen.ch>.

### Kelkaj artikoloj en aliaj lingvoj

Artikoloj en la franca :

– *L'Impartial, La Chaux-de-Fonds*, 14.4./-2007.

– *Revue historique neuchâteloise*, 4/2007.

Artikoloj en la germana :

– *Coopzeitung*, n-ro 27, 3.7.2007.

– *Bund*, Berno, 28.7.2007 kaj 2.11.2007.

– *Esperanto Aktuell*, Germana Esperanto-Asocio, 4/2007.

Kaj ekzemple recenzo en la ĉina de Liu Haitao.


## Premio Grabowski al du interlingvistoj

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo, precipe, sed ne nur, en la kampo de beleto. Ĉi-jare ĝiaj premioj havis interlingvistikan fokuson. La komisionanoj de la Fondaĵo (*Ulrich Lins, Istvan Ertl kaj Mine Yositaka*) aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al *Ilona Koutny* kaj *Andy Kuenzli*.



*Ilona Koutny*, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj jam de dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en la pola urbo Poznan. Spirita heredantino de prof. *Istvan Szerda-*

*helyi*, ŝi kvazaŭ transplantis la Esperanto-fakon de la Budapeŝta Universitato ELTE en polan grundon, kie ĝi disfloris intermacie.



*Andreas Künzli*, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio *Universallaj lingvoj en Svislando*, kiu donas panoraman bildon pri 100-jara historio de la movado ne nur Esperanta, sed ĝenerale planlingva, en Svislando. La riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco.

(Fotoj : edukado.org, La Ondo de Esperanto.)

## Danko pro aljuĝita premio

• *Andreas Künzli, okaze de la aljuĝo de la premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski*

Tiu 26a de julio restos memorinda tago, almenaŭ por mi mem. En ĝi koincidis samtempe malĝojo kaj ĝojo. Malĝojo pro la nepartopreno en la roterdama Universala Kongreso, aliflanke ĝojo pro la aljuĝo de

la ĉi-jara premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski al mi persone kiel aŭtoro/redaktoro de la libro *Svisa Enciklopedio Planlingva*, aperinta en 2006. Sendube, ambaŭ sentoj estas tre fortaj.

*Ho, mia kor' ! Ne batu maltrankvile*

...

Ĉi tiu premia aljuĝo, pro kiu mi tre ĝojas, fieras kaj sentas min tre

honorata, venis por mi tute neatendite. Mi nek konsciis pri tia eventualeco, nek aŭdacis revii pri tia intenco kaj decido flanke de tiu unika kaj bela Fondaĵo. Pro tio, la ĝojo estas despli granda, se feliĉiga mesaĝo alvenas en neatendita momento. Do ĉi tiu aljuĝo estas vera, granda surprizo. Sendepende de la alteco de la monsumo disponigata mi rajtas supozi, ke la premio Grabowski estas komparebla kun unu el la pli gravaj libro-premioj internaciaj aŭ naciaj. Estas tre bone, ke la Esperanto-movado disdonas premiojn. Same neatendite kiel falis la stelo de Grabowski sur min, sekve same neplanite aperis la ideo, ke mi verku, kiel decas en tia momento, konvenan dank-« paroladon ».

Volonte mi memoras analogan surprizan situacion antaŭ multaj jaroj, komence de la 90aj, kiam la Fondaĵo Ivo Lapenna aljuĝis al mi subvencieton por mia tiama universitata diplomverko pri la historio de interlingvistiko kaj Esperanto en la Cara Imperio kaj Sovetunio. Mi do fieras kaj pri la subvencio *Ivo Lapenna* kaj pri la premio *Antoni Grabowski*.

Ambaŭ eminentaj nomoj, kaj Lapenna kaj Grabowski, elstaras kun giganta signifo en la Esperanto-movado. La profesia juristo Ivo Lapenna (1909-1987), esperantisto de 1928, celis la oficialan agnoskon de Esperanto ĉe Unesko kaj ties membroŝtatoj. « Lia » triumfa montevidea rezolucio de 1954 formas ĝis hodiaŭ parton de la « Esperantomistiko » (kvankam la rezolucio de Sofio estis eble pli signifa). Kiel ajn, la agado de Lapenna estis nomita de

Reto Rossetti « herakla laboro » ; eĉ Marjorie Boulton ne povis ne verki apoteozan poemon pri Lapenna. Ĝis hodiaŭ Lapenna, kies signifo aliflanke laŭ ies opinioj estis ankaŭ troigita, vigle ekzistas en la memoro de multaj esperantistoj.

Nu, mia unuavica tasko ne estas glori Lapennan, kiu sendube kontribuis esence al la fortigo de la postmilita Esperanto-movado. Sed mi volus diri kelkajn omaĝajn vortojn pri Antoni Grabowski. Kvankam eble malpli konata al la nuna generacio de esperantistoj, ĉi tiu antaŭmilita pola Esperanto-pioniro havas sendube similan signifon por la Esperanto-lingvo kiel Lapenna por la postmilita Esperanto-organizo. Fakte ambaŭ *pacaj batalantoj* estis ne nur brilaj organizantoj, sed ankaŭ postlasis signifajn verkojn ofte menciatajn kaj ŝate legatajn ankoraŭ nuntempe. Kaj ili ambaŭ estis elstaraj lingvaj artistoj.

Antoni Grabowski, naskita en 1857 kaj mortinta en 1921, nature ne povis koni Lapennan, sed Lapenna ja menciis sian bravan antaŭulon multfoje en la monografio *Esperanto en perspektivo*. Kiel profesia kemiisto Grabowski kunigis lingvan talenton kun literatura intereso. Li ellernis multajn lingvojn, tiel ke iom post iom li scipovis 15 diversajn. Je tiu fono ne estas mirinde, ke li interesiĝis pri la demando de la internacia planlingvo, kiu en lia epoko fariĝis iom aktuala. Unue Grabowski lernis Volapukon kaj persone konatiĝis kun ties inventinto Schleyer. Sed post konstato, ke apenaŭ eblas praktike interkomunikadi en tiu lingvo, Grabowski seniluziigite forlasis tiun

projekton kaj en 1887 faris duan provon kun Esperanto. Grabowski estis forte impresita kaj pri ĉi tiu modele konstruita lingvo, kaj pri la eksterordinara personeco de ĝia kreinto L.L. Zamenhof, kiun li vizitadis en Varsovio. Tio sufiĉis por ke li decidu dediĉi sian propran vivon al la disvastigo de tiu grava projekto. Grabowski apartenis al la fruaj intelektuloj, kiuj komprenis la esprim-potencon de la lingvo Esperanto, kaj per kelkaj brilaj tradukoj li ankaŭ pruvis tiujn geniajn trajtojn de la zamenhofsidiemo. En 1888 aperis lia traduko de *La neĝa blovado* de Puŝkin, kaj en 1889 sekvis la traduko de *La gefratoj* de Goethe, se nomi la unuajn traduk-sukcesojn de Grabowski. Per *La parnaso de popoloj*, kiu prezentas 116 poemojn el 30 lingvoj kaj kulturoj, kaj *Sinjoro Tadeo* de Mickiewicz, respektive en 1913 kaj 1918, estis atingitaj la kulminoj de lia literatura maturo. Iom esplorante la verkaron de Grabowski, mi retrovis, ke li elpoligis interalie ankaŭ la poemojn *En Svisujo* de Juliusz Słowacki kaj *Sur la Jungfrau* de Maria Konopnicka, du el miaj ŝatataj polaj verkistoj.

Komence de la 1890aj jaroj Grabowski, kies portreto troviĝas tute komence de la UEA-Jarlibro 2007, malkontentis pro la malrapideco de la disvastiĝo de Esperanto. Supozante ke la kialoj troviĝas en la malperfekteco de la lingvo, li pledis por reformoj en Esperanto. Sed kiam la tikla voĉdono pri lingvaj reformoj okazis en 1894, li voĉdonis, kiel la plimulto, kontraŭ reformoj kaj, konsciante pri la genieco de tiu planlingvo, do helpis savi Esperanton de

teoriaj diskutoj, kiuj povus konduki al ĝia disfalo. Konvinkita pri la ĝusteco de la Fundamento de Esperanto, Grabowski senlace daŭrigis sian poresperantan agadon, ankaŭ kiel instruisto kaj organizanto.

Lapenna kaj Grabowski, vivante en diversaj landoj kaj aliaj tempoj, eble similis unu la alian en tio, ke ili estis malkontentaj pri la malrapida disvastiĝo de Esperanto kaj strebis al pli altaj atingoj. Laŭ la zamenhofsidiemo *Ni paŝo post paŝo post longa laboro atingos la celon en gloro* ili volis supozeble atingi tro multe kaj troigis. Laŭ malnova saĝo validas: kiu volas tro kaj troigas, tiu ofte fiaskos. Sed la kontribuoj de ambaŭ, eĉ se nur mikrosocie signifaj, tamen restas « ĉiusence grandaj », kiel Boulton emfazis en sia poemo pri Lapenna; tio sendube validas ankaŭ por Grabowski. Inter tiuj, kiuj komprenis la signifon de Grabowski, troviĝas ankaŭ Zofia Banet-Fornalowa, kies biografio pri Grabowski konsistigas la unuan seriozan provon prezenti la vivon kaj verkon de la fama pioniro.

En la premiita libro *Svisa Enciklopedio Planlingva* bedaŭrinde ne eblis trakti la verkon de Antoni Grabowski. Feliĉe lia nomo estas almenaŭ dufoje menciita, pli malpli hazarde, sur paĝoj 698 kaj 782, lige kun la 2a Universala Kongreso en Ĝenevo (1906), kie lia himno *Marŝo de l' Esperantistoj* estis prezentita, kaj en artikolo de la svisa planlingvano André Schild, kiu el vidpunkto de Interlingua traktis la demandon de la Internacia Lingvo. La mencio de Grabowski ĉe Schild pravas, ke tiu pola Esperanto-pioniro



estis respektata ankaŭ de la « konkurantoj » de la zamenhofa lingvo.

La ĵurio de la Fondaĵo Antoni Grabowski pravigis sian decidon, ke « la riĉa enhavo de tiu ĉi unika verko pri la planlingva movado de unu lando estas modela pro siaj scienca kompetenteco kaj objektiveco ». Mi tre ĝojas pro tiuj konkludo kaj laŭdo, kiuj estis faritaj en simila senco ankaŭ en pluraj jam aperintaj recenzoj. Mi konsentas kun la opinio de la ĵurio, ke temas pri unika verko, kaj unika okazo. Mi deziras interpreti, ke la premio estas aljuĝata ne al mi persone, sed al la verko mem, kiun mi havis la okazon efektiviĝi, kune kun ĝiaj apogantoj, subvenciantoj kaj eldonistoj, nome Svisa Esperanto-Societo (SES), Centro de dokumentado kaj studo pri la lingvo internacia (CDELI) kaj privataj sponsoroj.

Kvankam tia ampleksa kaj multifaceta verko kiel la svisa enciklopedio ne estas kaj ne povas esti perfekta, gravas, ke niaj historiografiaj kaj biografiaj entreprenoj estu science faritaj. Kaj se ni ne kapablas en ĉiuj kazoj esti sciencaj, ni klopodu almenaŭ esti ekzaktaj aŭ precizaj kaj objektivaj, kvankam ankaŭ tiu idealo estas aŭ povas esti, kiel ni ĉiuj scias, nur iluzio. En la enkonduko al la libro estas menciite, ke tia verko povus servi ne nur al la prilaborado de nia historio, sed helpi ankaŭ al la serioza publika propagando de Esperanto kaj de la interlingva ideo. Mi kredas, ke la svisaj legantoj de la enciklopedio komprenis tiun ideon. En la kerno de la libroprojekto mi ĉiam defendis tiun unuagradan, prioritatan inten-

con. Ĝia agnosko en 2008 fare de grava Fondaĵo sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, nobla organizo fondita antaŭ cent jaroj de la svisoj Hector Hodler, Edmond Privat kaj René de Saussure en Ĝenevo, tempe certe ne sekvas hazarde kaj povas esti konsiderata kiel simbola, kaj precedentata.

Mi sincere dankas al la Fondaĵo Antoni Grabowski kaj al ties ĵurio, konsistanta el la estimindaj sinjoroj d-ro Ulrich Lins, István Ertl kaj Mine Yositaka, pro ilia bonvolo, kiun samtempe ĝuas kune kun mi ankaŭ la de mi ŝatata kolegino d-ino Ilona Koutny. Kiel Antoni Grabowski ŝi vivas kaj laboras en Pollando, fakte en ĝia sama iama sektoro germana-prusa, kie loĝis Grabowski. Do ni trovis kaj aludis kelkajn interesajn geografiajn, historiajn kaj aliajn koincidojn. La monsumo rezultanta el la premio estu laŭ mia deziro parte reinvestata por la distribuo de la libro al interesataj sciencaj institucioj tra la mondo.

Por ne vekti en tia flata dankparolado la impreson de hipokriteco, ĉar mi konsideras min ankaŭ kiel homon kun tre kritika menso, jen plej lasta persona konsidero, kiu samtempe estas ĝenerala rimarko pri la aktuala situacio de interlingvistiko kaj esperantologio, ekzemple en Svislando: La Fondaĵo Grabowski agnoskas min kvazaŭ oficiale kiel « interlingviston ». Mi deziras atentigi ke mi, male al aliaj interlingvistoj, kiuj eble trapasis kaj finis iun oficialan studprogramon aŭ kiuj estas interlingvistike multe pli erudiciaj ol mi, aŭ kompare kun Ilona Koutny, kiu estas profesoro pri

interlingvistiko en universitato, disponas bedaŭrinde neniun oficialan diplomon, kiu konfirmus mian kompetenton pri tiu fako, kaj la superan ekzamenon de ILEI/UEA mi trapasis antaŭ multaj jaroj. Laŭ universitata kleriĝo mi estas filologo (slavisto), historiisto kaj diplomito pri internacia juro (tria faketo), cetere sen doktora titolo. En tiuj disciplinoj, kiujn mi finis en 1992, mi publikigis neniujn (signifajn) artikolojn. Do ne havante la okazon diplomiĝi pri esperantologio aŭ interlingvistiko, kvankam tiu opcio estis konata al mi, mi povas esti nur hobia, amatora, aŭtodidakta aŭ honor(ofic)a interlingvisto, kun la espero, ke tiu fako iam atingos pli grandan signifon, kiun ĝi sendube meritis.

Post kiam KCE/CDELI/SES en Svislando bedaŭrinde ne sukcesis instituciigi esperantologiajn kaj interlingvistikajn studojn sur pli alta publika aŭ ŝtata nivelo, necesus nun entrepreni novajn paŝojn en rektaj kontaktoj kun kantonaj universitatoj. Ne posedante la apogon aŭ konsilon de iu ajn, kaj sentante min pli kaj pli soleca kaj izolita en la esperantologia-interlingvistika kampo en Svislando, mi ne sciis kie kaj kiel komenci, kiel siatempe komencis Lapenna kaj Grabowski eble tute naive, sed kuraĝe kaj firme. La svissaj esperantistoj bedaŭrinde ne tro interesiĝas pri esperantologio kaj interlingvistiko, kaj tiuj kiuj havas esperantologiajn aŭ interlingvistikajn konojn aŭ kompetentojn, ofte ne vere konsideras sin esperantistoj. Ĉi tiun surprizan kaj evidente paradoksan kontraston necesas konsideri. Ŝajnas, ke fone de la grandaj aka-

demiaj transformoj, la ŝanĝitaj instru- kaj lern-prioritatoj, la ŝparpremo flanke de la politiko, la dubado pri la senco de malgrandaj, « orkideaj » fakoj (kiel slavistiko, cetere), la drasta konkurenco de ĉiuj flankoj ktp., tiaj ideoj, planoj kaj projektoj kiel la enkonduko de la planlingvaj studoj iĝis verŝajne ankoraŭ pli malfacile realigeblaj ol antaŭ jaroj, jardekoj, kaj devos resti privataj aŭ duonprofesiaj iniciatoj. Sed tiu opinio eble estas erara, kaj eventuale indus refari provojn. Tamen kiel solulo, kiel Davido, kiu devus konvinki ŝtatajn instancojn, Goliatojn, oni sentas sin tiom malforta en la kredo, ke oni supozeble malmulton atingos, kvankam oni dezirus.

Se rilate la aluditan « eternan gloron » de iuj verkoj oni volus je la fino de ĉi tiu dankparolado iom citi el la verkaro de nia ŝatinda Grabowski, jen eble taŭgus en nia kunteksto la du unuaj strofoj de originala poemo, kiun li dediĉis « Al la semanto » – la Majstro en Varsovio:

*Feliĉa la semanto estas,  
Printempe kiu semis grenon  
Kaj en aŭtuno ĝoje festas  
De bonrikolto la solenon.  
Feliĉa, kiu en la koro  
Pri granda verko flame revis,  
Kaj el la ĉarma revo-floro  
Maturan frukton elricevis*

Kaj, iom pli malmodeste, fama citaĵo el odo de Horacio, ellatinigita de Grabowski:

*Monumenton, ol bronz' kreis  
pli daŭran mi,*

*Supron de l' piramid' alte  
 superas ĝi.  
 Nek pluvega malsek', nek plej  
 impeta vent'  
 Ĝin detruos en kur' longa de  
 jaroj, nek  
 Tempo, kiu sen halt' pasas  
 senfine for.*

Kiel ni vidas, ankaŭ Grabowski okupiĝis pri la demando de la gloro. En tiu senco estu esprimita la deziro, ke la svisa enciklopedio servu kiel modelo por analogaj alilandaj projektoj. Espereble la aljuĝo de la premio Grabowski influos ankaŭ iomete la komercan sukceson de la svisa enciklopedio. Ĉiu aŭtoro deziregas, ke, se iel eble, la tuta mondo aĉetu kaj legu lian libron. Klare estas ke tiaj specifaj – kaj multekostaj – libroj kiel la mia ne furoras kiel plej ofte vendataj. Ĉiukaze por mi pli gravas kvalito ol kvanto. Sed mi estas kon-

vinkita, ke la premio Grabowski certe helpas, ke la svisa enciklopedio iam fariĝos bestselera. Kaj krom tio ĝi sendube helpas konservi aŭ eĉ fortigos mian motiviĝon plu labori, *rekte kaj ne deflankiĝante*, por Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko.

Fone de ceteraj elstaraj gravaĵoj, kiujn kreis aliaj esperantistoj, kompreneble ne decas pretendi, ke *Svisa Enciklopedio Planlingva* malgraŭ ĝia dikeco ricevu eternan gloron, male jes ĉiuj svisaj planlingvanoj, kiuj en la enciklopedio estas prezentitaj kaj al kiuj la verko estas dediĉita. Do, denove dankon, pro la plivalorigo de la verko, kaj pro la gratuloj ricevita de diversaj flankoj. Espereble la botelo de « Bona svisa vino al la fino », kiel Ed Borsboom titolis sian recenzon, baldaŭ povos esti solene malfermita !

## Tradukoj el la germana literaturo



Willy Nüesch,  
 kiu tradukis kaj eldonis.

*Don Karlos.* Friedrich Schiller  
*Elektitaj poemoj.* Conrad Ferdinand Meyer  
*Elektitaj poemoj.* Friedrich Schiller  
*Elektitaj poemoj kaj aforismoj.* Christian Morgenstern  
*Elektitaj poemoj kaj fragmentoj.* Novalis  
*Elektitaj poemoj kaj maksimumoj.* Johann Wolfgang von Goethe  
*Faŭsto I.* Goethe. Teatraĵo  
*Faŭsto II.* Goethe. Teatraĵo  
*La lastaj tagoj de Hutten.* Conrad Ferdinand Meyer. Poezio tradukita

### Laste aperis tri misterodramoj :

*La pordo de inicado.* Rudolf Steiner.  
*La provo de la animo.* Rudolf Steiner.  
*La gardanto de la sojlo.* Rudolf Steiner.



# Svisa kalendaro

## Septembre

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.  
3 : Luzern : LES-Kunveno.  
25 : Basel : ESB-Kunveno.

## Oktobre

- 1 : Luzern : LES-Kunveno.  
6 : Lausanne : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.  
11 : Chaux-de-Fonds : CDELI : André Cherpillod prelegas : *Unu jarcenton poste, la instruo de Ido*.  
12 : Vue-des-Alpes : André Cherpillod prelegas franclingve : *Des clartés sur la Bible* + Kreo de Esperanto-Amikaro de CDELI.  
23 : Basel : ESB-Kunveno.

## Novembre

- 1-2 : Berna regiono Gantrisch : Familia renkonto.  
3 : Lausanne : LES-Kunveno.  
12 : Luzern : LES-Kunveno.  
15 : Chaux-de-Fonds : CDELI-SES: Claude Piron.  
27 : Basel : ESB-Kunveno.

## Decembre

- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.  
10 : Luzern : LES-Kunveno.  
13 : Basel : Zamenhofa festo.  
13 : Lausanne : Zamenhofa festo.

2009

## Januare

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.  
7 : Luzern : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.  
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Studsabato.

## Februare

- 2 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.  
7 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.  
21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.

## Marte

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.  
10 : Redakta datlimo de *SES informas*.  
22 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.

## Aprile

- 4 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Kultura seminario.  
6 : Lausanne : LES-Kunveno.

## Maje

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

### Venonta redakta datlimo de *SES informas*: 2008 oktobre 10

La gvidantoj de la lokaj kaj fakaj societoj bonvolu atenti pri la venonta datlimo redakcia por la periodo novembra-decembra de la venonta *SES informas* 2008-4, kiu aperos komence de novembro 2008. Ili informu pri la datoj de la kunvenoj por la monatoj novembro-decembro 2008 kaj januaro 2009 kaj eĉ por la resto de la jaro 2009. Kaj ili ne forgesu raporti pri okazintaĵoj. Antaŭdankas pro tiu redakta kunlaboro Claude Gacond, CP 480, 2301 La Chaux-de-Fonds. Rete: [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)